

Bulteno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio – Fondita en 1908



La Vorto de la Prezidanto

Impresoj post Stella-Plage

„Dum mi verkas ĉi-tiun artikolon, restas vivaj en miaj memoro kaj koro la intensaj momentoj ĵus travivitaj en *Stella-Plage*. Antaŭ du tagoj la *24-a Eŭropa Renkontiĝo* finiĝis kaj nun alvenas reagoj, fotoj, kantoj, filmoj per la reto. Mirinda komunikilo, kiu permesas plu viviĝi eventon.

En la antaŭa bulteno, vi legis pri miaj sentoj rilate la feriejon *Stella-Maris*. Denove la animo de tiu loko inspiris nin ĉi-jare. Ene de tiu ĉi bulteno, vi povos legi la raporton majstre verkitan de nia amiko Jean *HENNEBERT*. Mi aldonas nur kelkajn impresojn, kiuj alvenas en mian menson, iom senorde, kvazaŭ tuŝetoj ĵetitaj sur impresionisman pentraĵon.

Ni fieras havi en nia Federacio, tiel faman artiston, kiel Jacques *YVART*. Por ni li elstaris: sen akompano de iu muzikisto, li kapablis tuŝi nian koron danke al sia multfaceta talento: bela basa voĉo, ĉarma rideto al sia publiko, varia repertuaro, trafaj klarigoj en Esperanto... Dankon Jacques, vi donis al ni grandan emocion!

Dimanĉon matene belaj sunradioj instigis plurajn el ni eniri la apudan kapelon por admiri ĝiajn mirindajn buntajn vitralojn.

Sekvo p. 2 • • •

La Nordfrancia Federacio en UFE kaj UEA Komitatkunsido de U.F.E. de la dimanĉo 7-a de Oktobro 2012

Jam de pli ol dek jaroj nia federacio aliĝis al UFE. Kaj tial ĝi havas reprezentanton en la komitato de UFE. Tiu reprezentanto estas nun *Claude LONGUE-ÉPÉE*.

Krome ankaŭ niaj gefederacianoj *Xavier DEWIDHEM* (eks-UFE-prezidanto), *Julia HEDOUX* (UFE-estraranino, vicprezidanto pri kongresoj) kiel individuaj membroj, kaj *Michel DECHY* kiel reprezentanto-prezidanto de GEE estas membroj de la UFE-komitato.

Je la dimanĉo 7-a de Oktobro kunsidis la UFE-komitato. *Xavier DEWIDHEM* ne povis ĉeesti, sed li rajtigis *Julia*.

Pluraj tagorderoj de la kunsido koncernas nian federacion kaj ĝiajn membrojn.

Je la dimanĉo 7-a de Oktobro kunsidis la UFE-komitato. *Xavier DEWIDHEM* ne povis ĉeesti, sed li rajtigis *Julia*.

Pluraj tagorderoj de la kunsido koncernas nian federacion kaj ĝiajn membrojn.

lu grava afero estis debatata. Temas pri la malkresko de la membraro de niaj asocioj, internacia UEA kaj nacia UFE.

Cetere mi ĵus skribis “malkresko”; sed en la oficiala raporto estas la vorto “falo”!

Aliflanke bedaŭrinde, ni povas konstati saman maltrankviligan fenomenon en niaj lokaj, grupaj kaj regionaj asocioj.

Tiu fenomeno estas ja maltrankviliga, ĉar ĝi malpliigas la efikon de niaj agadoj kaj eĉ la eblan nombron de tiuj agadoj. Dum ni estas prezentontaj kaj priemfazontaj, al la aŭtoritatoj de la nacia ministerio, nian “Petition por Esperanto en Abiturekzameno”, estus utile povi ankaŭ emfazi pri la pezo kaj la forta volo de nia membraro.

Tial mi vigle instigas niajn Nordfranciajn federacianojn konsideri la gravecon de la problemo kaj siajn eblecojn aliĝi al UFE kaj al UEA.

Ili povos peti de la sidejo de UFE la necesajn aliĝilojn...

... Kaj tiel konstati, ke la revuo ĵ

Eĉ por la nekredantoj la magio de la loko estiĝis. Belaj kantoj, spirantaj pensoj fervore deklamitaj kaj en Esperanto kaj en la franca, altiris multnombrajn partoprenantojn: esperantistojn aŭ ne, kredantojn aŭ ne, kiuj iom post iom plenis la kapelon. Dankon Frato BENOÏT.

Posttagmeze ĉiuj venis kuraĝigi nian 11-jaran, poliglota Martin, kiu premiere prezentis sian unuan prelegon kaj instruis nin pri sia plej ŝata besto: la rano. Por ni, li sukcesis venki sian timemon. Dankon Martin pro via kuraĝo kaj via laboro. Rekompence, ni ne forgesos venontjare donaci al vi etajn ranojn, tiel via kolekto ampleksiĝos.

En la prelegĉambro, per sia mirinda kolekto de santunoj Sylvain LELARGE estigis Kristnaskan etoson: spiritan, kvietan momenton de kunigo inter ni ĉiuj. Per la etajn **La Pastorale** ni pri-pensis la etajn miraklojn, kiuj okazas al ni, kaj kiuj plibonigas nian vivon. La jena grava demando finis la prelegon: Por vi, kiu estas la lasta miraklo?

Mia lasta miraklo estas tiu sukcesa renkontiĝo. Dankon al vi, kursgvidantoj: Katalin, Sylvain, Martin, Daniel, Claude, pro via sindonemo kaj frukto-dona laboro, dankon al vi karaj partoprenintoj, vi teksis ligojn el frata amikeco... **DANKON AL VI ĈIUJ!**

Vi estas bela donaco.

Lucy kantis por ni dum la meso:

<http://www.ipernity.com/doc/katalin.kovats/13832104>

*“Une terre s'arrose
Pour devenir jardin,
Et alors pour ta cause,
Avance, lutte et ose,
Mais dessertre les poings.”*

Tiuj vortoj gvidu nian agadon dum la tuta jaro 2013.

La projektoj ne mankas:

La prelego de Mikaelo BRONŝTEJN en Lille, la 30-an de Januaro.

En Februaro, la inaŭguro de Esperanto-strato en Beuvrages.

La 8-an de Junio, la tutmonda sesio de la KER-ekzamenoj.

Dum “**Les Pianos Folies**” en Le Touquet koncertos nia talenta rusa samideano Andrei KOROBEINIKOV.

“Le Monde de l’espéranto” de UFE kaj “**Esperanto**” de UEA estas tiom interesaj kiom nia “**Norda Gazeto**”!!...

Cetere, certe estas eksfederacianoj, aŭ ĵus finintaj kursanoj, kiuj ne aliĝas al siaj grupoj kaj al la federacio. Ĉiuj niaj aktivuloj konvinku ilin realigi aŭ unuafoje aliĝi...

Alia debato rilatis al la instruado de Esperanto. Pri la kursoj kaj la ekzamenoj; pri la kurslibroj, pri la kursgvidantoj kaj ties trejnado. Kaj kompreneble pri la “Peticio por Esperanto en Abiturekzameno”.

Listoj de la kursoj

Estas ja grave posedi ĝisdatigitajn listojn de niaj Esperanto-kursoj, kun ties niveloj kaj ties nombro de kursanoj, kaj kun ties responzuloj. Tio povos utili dum nia kontaktado kun la naciaj aŭtoritatoj. Kaj tio povos efiki al enskribiĝo de interesatoj.

Mi denove petas ke tiaj listoj estu precizigitaj en la lokaj agadraportoj aperontaj en nia gazeto en ĝiaj lokaj rubrikoj. Ili estu sciigoj al mi mem, kiu transsendos al UFE.

Nova lernolibro

Provante plialtigi la efikon kaj la intereson de niaj lernolibroj, UFE (kaj aparte ĝia prezidanto Axel ROUSSEAU) estas pristudanta (kun iu nova helpantino: Petra SMIDLÍUSZ) novan metodon por komencantaj plenkreskuloj lernantaj kadre de gvidata kurso por atingi la nivelon B1 de la KER-ekzamenoj.

Monhelpo de “Klubo 2000” al lernantoj trapasintaj la KER-ekzamenojn

“**Klubo 2000**” estas speciala konto de UFE, provizata per donacoj de la membroj, cele al helpo al specifaj agadoj por Esperanto.

UFE, pere de tiu kazo “**Klubo 2000**”, pretas subvencii la ekzamenojn de la KER-sesio okaz-

inta la 9-an de Junio 2012.

Nia Nordfranca federacio (kiel la bretona) jam subvenciiis siajn ekzamenojn.

Ĉi tiuj do ne estas koncernataj de la decido de UFE.

Trejnado de Esperanto-instruistoj. Pere de Katalin KOVÁTS

Katalin KOVÁTS pretas organizi kaj gvidi tiucelan seminarion. Ĝi daŭros proksimume kvindek tri horojn, ĉu dum unu semajnfino, ĉu dum du aŭ tri semajnfinoj.

En UFE Véronique BICHON kaj Karine TEXIER estas taskitaj pristudi la problemon, surbaze de listo de kandidatoj.

En nia federacio, la kursgvidantoj eventuale interesataj sciigu sian intereson al UFE.

UFE kaj GEE pripensu kiom ili povos elspezi por subteni la venon kaj ĉeeston al tia seminario. Ĝi povos okazi en Bouresse, aŭ ankaŭ en Parizo.

Peticio por Esperanto en Abiturekzameno

La sendo de subskribitaj peticioj al la responso eblis ĝis la 31-a de Oktobro 2012. Estos proksimume 30000 subskriboj.

Post kontakto de François LO JACOMO kun iu ĝenerala inspektoro de la ministerio pri instruado, iu specifa teamo de UFE prezentos la peticion al la ministro. Ĝi bezonas povi prezenti kaj komenti liston de Esperantistoj kapablaj: unufanke prepari tekstojn de skribaj bakalaŭraj ekzameneroj; aliflanke ekzameni kandidatojn kaj korekti ties taskojn.

Tiucele, en nia federacio, sin konatigu al la UFE-sidejo – kun kopio al la prezidanto de la federacio, Arlette PLUTNIAK – la posedantoj de la diplomo C1; kiuj ankaŭ instruis en Francia lernejo (de baza, meza, supera aŭ universitata nivelo). Ili ankaŭ precizigu, ĉu ili posedas diplomon pri kapableco de FEL.

Ja estas certe, ke alta diplomo kiel kapableco, atribuita de Franca

Instituto, havos ian pezon en la rezonado de la ministeriaj instancoj, por oficialigi Esperanton kiel laŭvolan opcion en bakalaŭro... Kaj ankaŭ espereble por iam agnoski Esperanton kiel instrueblan lingvon en diversgradaj lernejoj?!?!...

Cetere estas notinde, ke la FEI-kaj-KER-ekzamenoj ne taksas la samajn kapablojn. Eĉ *Katalin KOVÁTS* konsideras, ke ambaŭ estas same gravaj.

Ni do kuraĝigu niajn lernantojn trapasi la FEI-ekzamenojn (kies sesiojn ni organizu kun FEI) kaj la KER-ekzamenojn (pri kies sesioj zorgas UFE, *Bouresse, Grésillon*... kun *Katalin KOVÁTS*)!...

La kunlaboro de UFE kaj SAT-amikaro restas unu celo nepre konsiderenda. Kaj niaj kontaktoj kun SAT-amikaro devas nepre daŭri kaj efiki.

Ne necesas tiurilate memori la sukceson de la komuna organizado de nia kongreso de Bulonjo-ĉe-Maró en 2005, por kiu multe laboris aktivuloj de nia regiono (ofte membroj de niaj du asocioj UFE kaj SAT-amikaro). Same la kongreso de Sète en 2011. Same la lanĉo de nia peticio por bakalaŭro...

Bedaŭrinde tia kunlaboro fiaskis ĉi-jare por la organizo de komuna budo dum la "Fête de l'Humanité". Kaj same estis dum la ĵus pasintaj jaroj partopreno nek de UFE, nek de SAT-amikaro

en "Expolangues".

Sekve la UFE-komitato decidis: Intensiĝi niajn rilatojn kun SAT-amikaro. Aparte por partopreni, per preparo, organizo, luo de budo kaj deĵoro, en la manifestacioj, gravaj por nia reklamo de Esperanto, en:

"Fête de l'Humanité", kun ebla pago de UFE ĝis 7 500 €;

"Expolangues", kun ebla pago de UFE ĝis 2 000 €.

La komitato ankaŭ estis informata kaj debatanta pri diversaj aferoj:

Projekto Grundtvig

Ĝia celo estas krei retpaĝaron pri "Interkultura edukado: defioj por diverseca Eŭropo". Subvenciita projekto.

Kun kvar partneroj: kataluna, svisa, germana asocioj kaj UFE.

Estos kunveno pri la projekto dum la nacia kongreso de *Artigues*.

La plenumado de la projekto bezonos tradukistojn (Esperanta – franca).

Landasociaj agadplanoj proponitaj de komisiono de UEA. Interalie pri: Membrokotizoj de la landaj asocioj.

Rilatoj kaj informoj pri Esperantogado al landaj instancoj de UNO, UNESKO kaj oficialaj landaj instancoj. Rilatado kaj laboro de kursgvidantoj kun UFE kaj ILEI...

Estontaj landaj kongresoj:

Artigues, en 2013, kun la fervojistoj de

IFEF, de merkredo 8-a de Majo ĝis dimanĉo 12-a de Majo. Komuna kongreso kun SAT-amikaro en *Hérouville-Saint-Clair*, difnota de ambaŭ asocioj.

Universala Kongreso en 2015. Proponita en Lille

UFE oficiale kandidatigis por *Lille*. Okazis renkontoj kun reprezentantoj de UEA, kiuj vizitis la lokojn, ejojn, ktp. kaj kiuj trovis tro alta la luprezon de la kongresejo (ĉefe se ni bezonas lupreni la salonegon *Zénith* pro amplekso de la ĉeestantaro en iuj manifestacioj)...

Michel DECHY parolas pri tio en la agraporto de LVE, en ĉi tiu numero.

Eldono de nova albumo de Tinĉjo

Ĝi estis decidita. Estos presitaj 3 000 albumoj, kiuj baldaŭ aperos; kaj estos vendotaj la prezo de po 12,50 € por unu libro.

La iniciatinto de tiu afero, *Michel DECHY*, prelegos en diversaj okazoj pri la instruo de Esperanto per la Tinĉjo-albumoj en ĉiuj ajn niveloj.

Li ankaŭ raportas pri tio en ĉi-tiu numero.

Estas menciinde, ke la kunsido finiĝis akurate je la horo antaŭvidita.

Gratulojn al la prezidanto *Axel ROUSSEAU!!*

Resumis kaj komentis Claude LONGUE-ÉPÉE

Nia Eŭropa renkontiĝo

Stella-Plage de la 17-a kaj 18-a de Novembro 2012

Jen kio (eble) okazis...

Kiam mia ĉefredaktoro komisiis min raporti pri la 24-a Eŭropa Rendevo en *Stella*, mi tuj diris al li, ke multaj abonantoj de nia revuo jam ricevis (kaj eble eĉ legis) kelkajn el miaj raportoj pri la antaŭaj Rendevoj, do tre verŝajne ne bonvenigus plian similan artikolon...

Kvankam mi jam delonge suspektas, ke mia (aŭ eble ĉiu) ĉefredaktoro havas plenajn tirkestojn da tutpretaj

rebatoj al kia ajn argumento, lia demanda respondo tamen surprizis min:

– Ĉu iu ordonis al vi raporti nur veraĵojn? Ĉu en via ĵurnalisma lernejo oni ne instruis al vi metodojn por igi interesa la plej banalan artikolon?

– Jes ja! respondis mi, kaj silente foriris. Ĉu mi iam kuraĝos konfesi al li, ke mi eĉ ne scias, ke ekzistas ĵurnalismaj lernejoj? Mi tro timas,

ke li poste rifuzus pagi miajn artikolojn...

Jen do terura dilemo: ĉu mi tedu miajn legantojn per gurdado de jam konataj veraĵoj, aŭ provu interesi ilin pere de hontindaj mensogoj? Mia unua reflekso kompreneble estis...

Nu, ĉu vi vere interesiĝas pri mia unua reflekso? Verŝajne ne... Jen do la rezulto de mia tri-taga pripensado: ĉar leganto de la Norda Gazeto ne estas malklerulo, kaj tute

Ni nepre ĉeestu tiun unikan eventon, fine de Aŭgusto.

La 16-an kaj 17-an de Novembro, ni festos la jubilean 25-an Eŭropan Rendevuon en **Stella-Plage**.

Kune ni sukcesigos tiujn eventojn. Bonan Jaron al ĉiuj! //

Arlette PLUTNIAK



ENHAVO

ASOCIAJ TEMOJ

UFE ★ La Norda federacio kun UFE kaj UEA	p1
Fede ★ Raporto pri Stella-Plage	p3
E080 ★ Kiel evoluas "Espéranto 80"?	p9
ArE ★ Agad-raporto el Araso	p10
DuE ★ Agad-raporto el Dunkirko	p11
LVE ★ Agadraporto LVE	p11
LVE ★ Nova Tinĉo	p12
LVE ★ Boatado kun kortrejkanoj	p12
LVE ★ Esperanto en Bersée	p13
VaE ★ Agad-raporto el Valencieno	p13
VaE ★ Vivo de Valencienano: Constant MOYAUX	p14



kapablas distingi veron de malvero, mi decidis intermiksi kaj fikciajn kaj realajn okazaĵojn. Kaj mi poste ekkonsciis, ke tiu metodo ebligas ekredakti la raporton antaŭ la komenco de la priskribenda evento! Jen gravega avantaĝo, ĉefe kiam la ĉefredaktoro nepre postulas, ke nia artikolo estu publikigita pli frue ol la reportaĵoj de ĉiuj naciaj kaj internaciaj gazetoj.

Kara legantino, kara leganto, vi do malkovros ĉi-sube po du malsimilajn versiojn de ĉiu okazintaĵo, kaj vi bonvolu laŭplaĉe kredi tion, kio ŝajnos al vi ne tro malvera.

La veturado ĝis Stella-Maris

Provu diveni, kiu versio estas Fikcia, kaj kiu estas Vera...

=F= Pro mia akompananto, kiu alvenis miahejmen iom malfrue, ni ekveturis kvin minutojn post la antaŭplanita horo, kio devigis nin sekvi dum preskaŭ ses horoj kvazaŭ senfinan vicon de ducent nepretervitureblaj traktoroj ekveturintaj kvindek sekundojn pli frue ol ni. Tial, duonhoro antaŭ la vespermanĝo en *Stella-Maris*, ni troviĝis ankoraŭ dudek kvin kilometrojn for de la feriejo! Bedaŭrinde, ni iom post iom konstatis, ke pro la oftaj kaj abundaj pluvegoj de la antaŭaj semajnoj, ĉiuj riveroj de nia regiono ŝveliĝis tiagrade, ke tiuvespere neniu vojo ebligis atingi aŭtomobile nian marbordan celon. Sekve, dek minutojn post la verŝajna fino de la koncerto de *Jacques YVART*, ni ankoraŭ estis vagantaj ie en la kamparo! Tiam ni rezignis, kaj decidis retroveturi al *Béthune*. Sed apud la urbo *Hesdin* mia kunvojaĝanto subite ekhavis ideon, kiun mi tuj taksis genia: anstataŭ rehejmenigi, ni do veturis ĝis la flughaveno de *Lille-Lesquin*, el kiu ni ekflugis je la 3-a matene al Londono, por poste veturi trajne al *Dover*, kie ni sukcesis surŝipiĝi. Pro malfavora ventego, nia velŝipeto finfine atingis la strandon de *Stella-Plage* post tridekses-hora marvojaĝo. Duonhoron poste ni mire eksciis, ke la Eŭropa Rendevuo fakte okazis ĉi-jare en *Morbecque*!

=V= Mia veturado ĝis *Stella* disvolviĝis absolute senprobleme, sennebulle, senĝendarme, senakcidente, senproverbe (ĉar ĉi-foje akompanis min nek Teĉjo nek Siĉjo), kaj eĉ senharinge ĉar la ĉi-jara haringo-festo en *Étaples* jam okazis antaŭ unu semajno.

La oficiala akcepto

Se vi opinias, ke ambaŭ versioj estas veraj, vi eraras!



=F= Ĉi-jare mankis neniu akuzativo en la oficiala bonveniga parolado. Oni rimarkis nur kelkajn troajn n-finaĵojn. Poste *Katalin KOVÁTS* disdonis diplomojn al kelkaj trapasintoj de la junia Arasa KER-ekzameno. Kiam ŝi enmanigis al mi la prestiĝan C1-diplomon, mi estis tiel emociita, ke nur du vortoj sukcesis eliĝi el mia buŝo: "Thank you!"

=V= Apenaŭ alveninte en la akceptejon, ĉiuj malavaraj samideanoj, kiuj per mondonaco kontribuis al la restarigo de la tomo de nia pioniro *Émile GROSJEAN-MAUPIN*, ricevis belan numeritan (kaj koloran!) atestilon de la Norda Federacio. Poste, ĉiuj ĉeestantoj (iuj ŝparemaj, aliaj pli malavaraj) povis dum kelkaj minutoj ne nur foliumi (kaj eĉ aĉeti) kelkajn el la multnombraj libroj de la Genta libro-servo, sed ankaŭ admiri (kaj eĉ aĉeti) skulptaĵojn de *Alain CHALM* kaj pentraĵojn de niaj federacianinoj *Francine LONGUE-ÉPÉE* kaj *Joëlle MULLER*.

Preskaŭ je la antaŭplanita horo ek-aŭdiĝis la bonveniga parolado de *Arlette PLUTNIAK*, iom pigre tradukita de ŝia edzo *Edmond*, kiu plurfoje ŝajnis revii anstataŭ aŭskulti... Tuj poste, nome de U.F.E. *Julia HÉDOUX* (vicprezidantino) kaj *Sébastien MONTAGNE* (kasisto) ricevis de la Norda Federacio atestilon ne nur belan,

numeritan, kaj koloran, sed eĉ grandformatan! Tiel ni ĉiuj eksciis, ke ankaŭ U.F.E. donacis monon por la tombo de **GROSJEAN-MAUPIN**.



Finfine, tiuj el la ĉeestantoj, kiuj en Junio sukcese trapasis la skriban parton de la tutmonda KER-ekzameno, ricevis de **Katalin KOVÁTS** ege oficialan kaj belaspektan KER-diplomon. Bedaŭrinde, mi ne povis foti la diplomitan grupon, pro tio ke oni devigis min stari pli-malpli ridetante meze de ĝi.

Tamen estas vere, ke **Sylvain LELARGE** afable proponis foti nin per mia propra fotilo, sed ĉu eblas fidi ulon, kiu fieras prezenti al la publiko siajn "mirindajn kolektojn"? Mi ankoraŭ hezitis inter la avantaĝo esti fotita de mia fotilo, kaj la mal-avantaĝo vidi mian fotilon fariĝi unu el liaj mirindaj kolektaĵoj, kiam la organizantoj petis, ke ĉiu ĉeestanto nun sekvu sian grupestron ĝis ties laborsalono.

Guste tiam **Claude LONGUE-ÉPÉE** ekkaptis la mikrofonon, anoncis ke delegacio baldaŭ alportos al la ministro la peticion "*L'espéranto au bac!*", kaj petis, ke ĉiuj diplomitoj kapablaj instrui Esperanton en liceo kontaktu kiel eble plej baldaŭ S-inon **Monique ARNAUD**. Ĉu mi iam kuraĝos konfesi al li, ke antaŭ ok jaroj mi vendis mian teknon okaze de iu pulbazaro?

La libro-servo

Vi verŝajne jam komprenis, ke nur

unu versio estas plene vera...

=F= Ĉi-jare la estara libro-servo de niaj belgaj geamikoj proponis nur elektronikajn librojn. Tial ili disponis nek pri vasta salono, nek pri longaj tabloj, sed pri nur unu malpezega usb-memorilo. Unu el la ĉefaj avantaĝoj estis, ke la elektronika versio de "La Grafo de Monte-Kristo" (tradukita de **Daniel MOIRAND**) kostas nur kvardek elcentojn de la prezo de la papera versio. Unu el la ĉefaj malavantaĝoj estis ke, post la perdo (aŭ eble ŝtelo) de la usb-memorilo, ĉiuj libroj fariĝis neaĉeteblaj post iomete malpli ol dek tri minutoj. Bedaŭrinde, ĉar mi jam estas 68-jara, mi ne povas certi, ke restas al mi sufiĉe da tempo por legi ĉion tion...



=V= Kiel kutime deĵoris ĉe la libro-servo niaj belgaj geamikoj **Katja** kaj **Hans**. Mi aĉetis la Beletran Almanakon de Junio 2012, dum mia lernanto aĉetis trilingvan filozofiaĵon, per kiu li eble povos lerni samtempe Esperanton kaj la ĉinan lingvon. Mi esperas, ke niaj legantoj konsentos pardoni min, sed mi tute forgesis kontroli, kiuj libroj estis aĉetitaj (aŭ ŝtelitaj) de la aliaj ĉeestantoj. Nu, tion iomete montras la fotoj, kiujn mi baldaŭ enretigos en la nord-federacian retejon.

Cetere indas precizigi, ke estas perfekte vera mia rimarko de la antaŭa paragrafo koncerne la prezon de la elektronika versio de iuj libroj.

La laborgrupo o por komencantoj

Kiel kutime, nur unu versio estas fikcia...

=F= La lingvo Esperanto estas tiel facila, kaj **Claude JAUSIONS** instruis tiel efike al la komencantoj, ke post apenaŭ unu horo ili ĉiuj fariĝis progresantoj. Tial la laboro povis jam ĉesi sabaton je la 16-a horo, kaj la freŝdataj progresantoj rajtis plezure naĝi en la maro ĝis la vespermanĝo. Preskaŭ dronis nur unu obstinulo, kiu tro malproksimiĝinte de la bordo persistis peti helpon ne krokodilante!



=V= Survoje al la saloneto, kie instruis **Claude JAUSIONS**, mi renkontis kelkajn krokodilantojn, kies paroloj tuj kompreniĝis al mi, ke ili estas komencantoj, kaj ke en ilia grupo ĵus komenciĝis la paŭzo. Mi tamen paŝis plu ĝis ilia instruejo. Ĉar en mia antaŭa vivo mi estis licea instruisto, tuj ŝokis min la malgrandeco de la papera skribtabulo, sur kiu legeblis nur kelkaj vortoj kaj frazetoj. Nur poste mi ekvidis la kursgvidanton, kaj demandis al li, ĉu tia malgranda tabulo taŭgas. Nu, respondis li, komence de la kurso estis ĉi tie du tabuloj, sed iu venis kaj forprenis unu!

Feliĉe la ĉambro estis malgranda, neniu el la ok geleernantoj sidis malproksime de la tabulo, do ne necesis skribi per gigantaj literoj. Post la paŭzo revenis la kursanoj, kaj mi ja konstatis, ke post apenaŭ unu horo kaj duono ili jam kapablas konstrui kaj prononci esperantlingvajn frazetojn. Silentis nur la ununura observanta instruisto: **Claude LONGUE-ÉPÉE**.

La paroliga grupo

Unu el la proponitaj versioj ja estas vera, sed kiu?

=F= Du tagojn antaŭ la Eŭropa

Rendevuo, **Sylvain LELARGE** estis trafita de gripa bronkito. Tial lia paroliga grupo fariĝis mima grupo. Tio kompreneble iom malrapidigis la laboron... Feliĉe ĉiuj partoprenantoj konsentis ne vespermanĝi, kio ebligis al la talenta grupulo plenumi mime sian antaŭplanitan programon, kaj provizis kromajn desertojn al la kaj de la aliaj grupoj.



=V= Same kiel en 2010 kaj 2011, **Sylvain LELARGE** denove gvidis ĉi-jare la paroligan grupon. Nu, pro la vortoj "same kiel" niaj legantoj eble riskus imagi, ke la laboro disvolviĝas ĉiam laŭ la sama programo. Tute male! Ja la vizaĝo, la bereto, kaj la voĉo similas, kaj ankaŭ la plezuro kaj la intereso de la ĉeestantoj. Sed ĉi-foje ŝanĝiĝas ĉio alia! Ĉi-jare, unu semajnon antaŭ la Rendevuo, **Sylvain** petis retroŝte, ke tiuj, kiuj aliĝis al lia konversacia rondo, kunprenu unu artaĵon, kiu tuŝas ilin emocie, kaj ankaŭ unu objekton el fora lando. Post la fino de la Rendevuo, unu el miaj spionoj klarigis al mi, ke dum la sabata posttagmezo **Sylvain** tre efike paroligis kvarope siajn grupanojn pere de kvin interesaj kaj ofte amuzaj ekzercoj, kiuj devigis ilin jen priskribi ŝatatan kaj malŝatatan pentraĵon, jen malkovri kaj preparoli subtilajn diferencojn inter du bildoj, jen divenigi vorton al siaj kunludantoj, jen resumi gazetan artikolon, ktp.

La grupo pri literaturo

Nepre ne kredu, ke ambaŭ versioj estas fikciaj!

=F= Spertis gravan elreviĝon ĉiuj aŭtografŝatantoj aliĝintaj al la grupo de **Daniel MOIRAND**: nek **Edmond DANTÈS**, nek **S-ro DE VILLEFORT** ĉeestis por dediĉi la romanon tradukitan de la grupestro. Feliĉe, hispana ĉeestantino nomata *Mercedes*, al

kiu mi montris mian ekzempleron de La Grafo de Monte-Kristo, konsentis verki sur ties unuan paĝon la jenan neforgeseblajn: "*Mi amas vin pli ol Fernand-on, sed malpli ol Edmond-on!*", kio tuj instigis mian najbaron laŭte proklami: "*Kiam mi pensas pri Fernand-o, mi...*". Bedaŭrinde, ĝenerala ekrido malhelpis min aŭdi la finon de lia frazo. Mi tamen memoras, ke alulo tuj poste diris "*BRASSENS*" aŭ ion similan...



=V= Ĉar mi jam legis (per elektronika legilo) pli ol sepcent paĝojn el La Grafo de Monte-Kristo, jam enkapigis la diversajn nomojn, kromnomojn, alinomojn de la ĉefaj rolantoj de la romano, kaj preskaŭ kapablis rememori, ĉu **MORCERF** estas (aŭ eble ne) alinomo de **DANGLARS** aŭ de la abato **BUSONI**, mi ja esperis, ke **Daniel MOIRAND** pritraktos ĉi-sabate la romanon de **DUMAS**. Tamen ne: li tuj anoncis, ke li parolos pri La mil kaj unu noktoj!

Fakte, la klerega tradukisto unue klarigis, kial lia traduko ankoraŭ ne estas eldonita. Poste li rakontis kiamaniere **Antoine GALLAND**, filo de malriĉa plugisto, sinsekve fariĝis sperta orientalista, sekretario de la ambasadoro de la franca reĝo Ludoviko la 14-a en Istanbulo, kaj sekve, malkovrinto kaj unua tradukinto al la franca de pergamenaj manuskriptoj pri la fabeloj de Ŝerazad. Diversaj anekdotoj interesigis nin pri aliaj manuskriptoj kaj tradukistoj, kaj ankaŭ pri la Hindia deveno de tiuj fabeloj.

Fine de la posttagmezo, **Daniel MOIRAND** proponis, ke la dudeko da ĉeestantoj provu traduki en Esperanton la fabelon de la trideka nokto. Kaj ni baldaŭ konstatis, ke por ĉiu franca termino ekzistas preskaŭ pli da esperantlingvaj vortoj, ol da traduk-

antoj. Tamen okazis neniu batalo inter it- kaj at-istoj...

Ĉu mirigos vin ekscii, ke la postan nokton konversaciis en miaj sonĝoj **Edmond DANTÈS** kun **Ali BABA**, la ĉefa viziuro kun **CADEROUSSE**, la tradukistoj **ANTOINE GALLAND** kaj **MARDRUS** kun la marsejla ŝipekipisto **MORREL**?

Dimanĉon matene mi ne plu estis en *Stella*, sed amika spionino raportis al mi, ke la preleganto profitis de mia foresto por abunde paroli pri la mirinda aŭtoro de La Grafo de Monte-Kristo. Li kunportis librojn, gazetojn, eĉ libron titolitan "*Le Code noir*", entenanta la leĝaron pri la sklavaro de la tiamaj francaj kolonioj. En tiu libro oni malkovras, ke infano de blankulo kaj nigrolino naskiĝis sklavo, dum infano de blankulino kaj nigrolo estis libera homo!

Alexandre DUMAS-DAVY DE LA PAILLETERIE, kies patro estis mulato kaj denaska sklavo (sed tamen fariĝis generalo!), ofte spertis rasismajn aludojn. Li iam sprite respondis al iu mokemulo: "Mia patro estis mulato, mia avo estis nigrolo, kaj mia praavo estis simio. Vi vidas Sinjoro, ke mia familio komenciĝis, kie la via finiĝas". La Grafo de Monte-Kristo estas, laŭ **Daniel MOIRAND**, la plej interesa romano de **DUMAS**. Ĝia traduko fare de la preleganto ja estas iom multekosta, sed ĝi konsistas el du dikaj belaj volumoj (aŭ, laŭplaĉe, el malpeza elektronika versio, kies prezon mi jam aludis).

Preparado al la Eŭropaj KER-ekzamenoj

Ne ĉio, kion mi skribis, estas vera...



=F= Ĉar brile sukcesis multaj trapasintoj de la juniaj tutmondaj skribaj KER-ekzamenoj, kvincent tridek ok homoj aliĝis ĉi-jare al la

grupo de **Katalin KOVÁTS** por informiĝi pri la parolaj ekzamenoj. Kompreneble neniu salono estis sufiĉe vasta por akcepti ilin. Provante trovi kontentigan solvon, la organizantoj de la Rendevuo longe hezitis inter la Teatro de Bulonjo-ĉe-mar kaj la *Zénith de Lille*. Finfine ili decidis proponi la strandon de *Stella-Plage*, sed tio ne vere plaĉis al la grupestrino, kiu do sendis ĉiujn siajn aliĝintojn al la laborĉambro de **Anne JAUSIONS**.

⇒V= En la laborsalono de **Katalin KOVÁTS** sidis kaj religie aŭskultis pli ol dudek samideanoj, kiuj ricevis tre taŭgajn konsilojn koncerne la preparadon al la parola parto de la KER-ekzamenoj. Mi interalie aŭdis, ke la kandidatoj nepre ekzerciĝu al sinkoncentrado, unue per atenta aŭskultado de nacilingvaj sondokumentoj! Fakte, ĵus aŭdinte eĉ perfekte kompreneblan nacilingvan radioelsendon, ni ofte konstatas, ke pri ĝi restas en nia menso nur malprecizaj memoraroj. Kompreneble la afero ne fariĝas pli facila, kiam temas pri lingvo ne gepatra... Des pli, ke mi ĉeestis apenaŭ kvin minutojn, mi tute ne kapablus resumi ĉiujn konsilojn de **Katalin**. Sufiĉas diri, ke miaj spionoj taksis ilin ege interesaj kaj utilaj. Eĉ spertulo, kiu jam antaŭ dek jaroj parolis tre flue la internacian lingvon, estis tre kontenta ekscii, el kio precize konsistas la parola parto de la KER-ekzameno.

Preparado al la duanivela ekzameno de FEI

Ĉu vi rimarkis, ke mi ne ĉiam mensogas?

⇒F= Kiam komencis eniri en ŝian salonon kelkaj el la kvincent tridek ok aliĝintoj de alia grupo, **Anne JAUSIONS** unue ridetis kaj afable proponis, ke ili sidigu apud la jam laborantaj ĉeestantoj. Post tri minutoj ŝi petis, ke ĉiu novulo alportu seĝon. Kvin minutojn poste sidis homoj sur la fenestrobrotejo, sur la planko, sur la tablo de la kursgvidanto, kaj pliaj staris en ĉiu libera loko. Kiam la starantoj tute kaŝis la skribtabulon, la grupestrino decidis, ke jam estas tro

da kandidatoj por la duagrada ekzameno de FEI.

Ŝi do anoncis, ke estas nenio pli por diri koncerne la duanivelan ekzameno, kaj ke nun komenciĝas la preparado al la tria nivelo. Post kvaronhoro restis nur du ĉeestantoj...

⇒V= Kvankam mi ofte estas iom malserioza, mi ne povas silenti pri tio, ke ŝajnas al mi ege bedaŭrinde, ke neniu aliĝinto intencis ĉi-jare prepari sin al la duanivela Esperanto-ekzameno de la Franca Esperanto-Instituto: same utilas kaj la KER- kaj la FEI-ekzamenoj, ĉar ili kontrolas malsamajn lingvajn kompetentojn.

Tamen, en ĉiu malbono estas iom da bono: **Anne JAUSIONS** rajtis ĉi-jare ripozi en la laborgrupo de **Daniel MOIRAND**.

Vespermanĝo

Ne estus malvere aserti, ke mi ne malofte rakontas malveraĵojn.



⇒F= Eceptokaze la menuo konsistis ĉi-jare el fiŝsupo, fritoj, mituloj, fromaĝo kaj glaciaĵo. Ĉar okazis neniu krokodilado, aŭdiĝis nur agrable esperantlingva zumado.

Kiam alvenis la fiŝsupo, mi proponis al miaj samtablanoj: *"Mi vetas dek eŭrojn, ke poste venos fritoj"*. Unu respondis: *"Kaj mi vetas cent eŭrojn, ke kun la fritoj venos mituloj!"*. Alia rebatis: *"Mi pretas veti mil eŭrojn, ke poste venos fromaĝo kaj glaciaĵo!"*. Mirigite mi demandis: *"Ĉu vi ĉiuj jam ĉeestis en 2010 kaj 2011?"*. Ili ĉiuj respondis samtempe: *"Ne, sed mi ĵus legis la afiŝitan menuon!"*.

Ĉar de mituloj oni maĉas ne la konkon sed nur la internan molaĵon, la vespermanĝo daŭris tiel mallonge, ke la koncerto de **Jacques YVART** povis komenciĝi iomete antaŭ la 20-a!

⇒V= Kvankam ege plaĉas al mi frandi en marborda urbeto bongustajn mitulojn kaj fritojn, mi jam delonge divenis, ke mia stomako sekrete preferas, ke mi vespermanĝu iomete pli askete. Tial, tuj plezurigis min la menuo afiŝita ĉe la enirejo de la restoracio: kiŝo el brokoloj kaj fromaĝo Maroilles, sekvota de mistera plado titolita *"cassolette étaploise"*, poste de fromaĝoj kun spickuko, kaj fine de la neevitebla glaciaĵo.

Hm! Ĉio tio eble konsistigas ne vere asketan menuon... Nu, post mallongega hezitateto mi tamen decidis zorgi ne pri la sekreta prefero de mia stomako, nur pri mia frandemo. Kaj la sekvo pruvis, ke mi prave agis.

Koncerto de Jacques YVART

Tamen estas vere, ke mi kelkfoje raportas veraĵojn...



⇒F= Estigis grandan surprizon, ke nia talentega Dunkirka kantisto regalas tiuvespere sian publikon per kanzonoj ne nur de JoMo kaj Kajto, sed eĉ per kelkaj de **Chantal GOYA** kaj **Carla BRUNI**. Post du horoj iu demandis al li, ĉu li intencas kanti sian propran repertuaron. Li tre afable respondis, ke sufiĉas aĉeti la KD-ojn...

⇒V= Mi tre sincere dankas al **Jacques YVART** pro la agrablega vespero, kiun mi pasigis aŭskultante lin kaj lian gitaron. Li belege kantis jen en Esperanto, jen en la franca, jen eĉ en la lingvo de iu malaperanta popolo de Ĉadlando. Li tre ofte partoprenigis la ĉeestantaron, kiu ne nur vikle aplaŭdis sed ankaŭ plezure kantis kun li. Ĉu vere necesas, ke mi aldonu pliajn laŭdojn? Vi tutcerte jam legis tiujn de **Arlette PLUTNIAK** en nia rubriko "La Vorto de la Prezidanto". Nur unu aferon mi tre bedaŭras: ĉar atendis min duhora veturado tra

pluva nokto, mi ne povis resti ĝis la fino de la spektaklo, kio malhelpis min aĉeti kelkajn KD-ojn! Nu, la retejo www.vinilkosmo-mp3.com verŝajne kapablos konsoli min...

La dua tago

Ne ĉio, kio ŝajnas fikcia, estas vera...

=F= Dimanĉon matene iom post iom evidentiĝis, ke la majoj erare kalkulis la daton de la Mondfina Katastrofego, kiu tre verŝajne ne povos okazi la 21-an de Decembro, pro tio, ke ĝi jam okazis dimanĉon la 18-an de Novembro: je la 11-a horo matene ankoraŭ plene noktis, kaj la ekstera temperaturo estis nenormale negativa: -25° !

Kiam, iomete antaŭ tagmezo, la organizantoj finfine decidis ĉesigi la Rendevuon, la termometro de mia aŭto indikis -63° kaj mi ne sukcesis startigi la motoron. Mia lasta penso estis: "Ve! Kia stultulo! Hieraŭ mi senutile elspezis tiom da mono por plenigi la benzinujon! Nu, almenaŭ mi ne plu zorgu pri mia raporto por la Norda Gazeto...". Kaj tuj poste mi senkonsciigis.

Je la 13a 35 mi iom post iom rimarkis, ke mi nun staras (kaj eĉ antaŭenpaŝas) meze de nubeca mallarĝa tunelo, kiu ŝajne kondukas al blinda lumfonto. Mi sensukcese provis diveni, pri kio temas, kiam subite aperis blanka panelo indikanta per fajraj literoj "Paradizo: 500 m – Bonvolu prezenti vian aliĝilon"!

Feliĉe, ĉar mi tute hazarde forgesis poŝti mian aliĝilon al la Eŭropa Rendevuo, ĝi ankoraŭ troviĝis en sia koverto adresita al Arlette **PLUTNIAK**, en la dekstra interna poŝto de mia jako. Mi do firmaŝe kaj plej rapide aliris la Paradizon, fiere svingante mian esperantlingvan enirpermesilon. Imagu do mian surprizegon, kiam tuj traironte la Paradizan Pordegon mi estis, ĉe la lasta sekundo, haltita de tute blanke vestita ulo, kiu solene avertis min: "Via ĉefredaktoro alvenis ĉi tien antaŭ kelkaj minutoj. Li tuj petis kaj ricevis permeson kontakti nian stabon, kaj tuj poste estis decidite, ke vi restu ekstere, ĝis via artikolo estos plene redaktita kaj ĝisfunde

korektita!"

Nekredeble! Kial ili ne sendis lin en la Inferon?

=V= Kiel kutime mi rehejmeniĝis sabaton je noktomezo. Tamen, ĉar iomete malplaĉas al mi frustri la legantojn (kiuj tutcerte tuj sendus al mia ege estimata ĉefredaktoro centojn aŭ eĉ milojn da riproĉaj retmesaĝoj), mi petis de pluraj geamikoj sciigojn kaj komentojn pri la dua tago de la Eŭropa Rendevuo. Tiel mi eksciis, ke, inter la fino de la matena laborado kaj la tagmanĝo, multaj partoprenantoj jen promenis, jen preĝis, jen foliumis.

Instigitaj de la agrabla vetero, ok el la promenemuloj piediris ĝis la marbordo. Survoje ili rimarkis kelkajn tre belajn ĝardenojn. Aparte menciindas, ke pro la ĉeesto de dukruva plena vortaro (kies oficiala nomo estas **Claude LONGUE-ÉPÉE**) neniu bezonis krokodiladi.

Laŭdire, la malalta tajdo helpata de la brila suno kaj de la blua ĉielo aspektigis la plaĝon mirinde bela. Eble tro absorbitaj de la hipnotiga panoramo, ĉiuj forgesis naĝi...

Dume, en la kapelo de *Stella-Maris* la preĝemuloj povis ĉeesti esperantlingvan meson, en kiu belege kaj kortuŝe kantis la fama poldevena kantistino **Lucy ADAM**.

politikistoj. La aŭtoro dediĉis ĝin tre originale, desegnante en angulo de kaŝĉambro eksan Prezidenton de Francio kun azenkapa ĉapo...

Antaŭ la tagmanĝo, la suna vetero ebligis foti sur la korto de *Stella-Maris* la (preskaŭ) tutan staĝanaron malantaŭ (ne sufiĉe) larĝa Esperanto-banderolo, kies eskremaĵojn firme tenis du pentristinoj de la Norda Federacio.

Okaze de la tagmanĝo spertis duan gravan desapontiĝon amikino mia, kies ĉefa motivo por aliĝi ŝajne estis la memorindaj mituloj (kaj fritoj) de la antaŭaj jaroj!

Ŝi tamen grandplezure frandis la flandran karbonadon, spite la ioman klakadon de kelkaj krokodilecaj makzeloj...

Posttagmeze okazis tri prelegoj de la internacia familio **KOVÁTS-LELARGE**, kiu intencis montri al la publiko kelkajn el siaj mirindaj kolektitaĵoj. Unue parolis la filo Marteno pri ranoj, sed ne pri tiaj fabelaj ranoj, kiaj subite fariĝas princinoj! Ne, tute simple pri kvakantaj senvastaj vertebruloj el la klaso de amfibioj, kies senveruka haŭto povas esti blua, flava, skarlata, aŭ eĉ samideanece verda...

Kompreneble Marteno montris kaj



Sed kion faris la foliumemuloj? En la apuda banurbo *Le Touquet* ili kompreneble vizitis la ĉi-jaran Libro-Salonon. Unu el niaj federacianoj ne nur foliumis, sed ankaŭ aĉetis humuran libron pri la francaj

komentis nur lumbildojn kaj statuetojn. Li krome kontrolis la konojn de la ĉeestantaro per trafaj demandoj. Ekzemple: "Ĉu ranoj havas orelojn?". Se la respondo interesas vin, nepre aliĝu al *Stella-2013*!

Tre impresis la publikon iu Sud-Amerika rano, kies veneno estas tiel danĝera, ke eĉ unu miligramo sufiĉus por mortigi dudek homojn!



Se vi iam malkovros neordinarajn ranfiguretojn, ne hezitu aĉeti ilin por vi mem, sed bonvolu nenium donaci al Marteno, kies patrino ŝajne ne plu scias kien stakigi ilin...

Tuj poste ni eksciis, ke *Katalin*, kies patro estis poŝtofiscisto, kolektas fotojn pri leterkestoj. Fakte ŝi eĉ publikigas ilin, danke al la ne-malpermeso de la posedantoj...

Ŝi plurfoje rimarkis fortan rilaton inter iu domo kaj ties leterskatolo. Kompreneble ne interesas ŝin la banalaj ekzempleroj aĉeteblaj en superbazaroj. Tial la ĉeestantoj mire malkovris, ke plej diversaj aĵoj kapablas akcepti leterojn: lavmaŝina tamburo, ĝardena ilo, surgrunda sen-

tegmenta skatolo (tamen kun ŝtoneto, por ke la leteroj ne forflugu), aŭ eĉ duskatola aranĝo, kies facile atingebla kesteto bonvenigas ĉekojn, sed kies fakturujo estas alkrōĉita supre de alta stango...

Katalin aparte menciis la vilaĝon *St-Martin d'Abbat* (proksime de *Orléans*), kiu famiĝis danke al siaj multnombraj originalaj (kaj ofte artaj) leterkestoj.

Fine parolis *Sylvain*. Li unue rakontis, kiel lia patro unuafoje ekvidis en Londona buso (kaj sub franca gazeto) la krurojn de sia onta edzino, kio erare supozigis al la publiko, ke baldaŭ aperos sur la ekrano kolekton de kruroj...

Fakte, lia patrino naskiĝis en la Provenca urbo Marsejlo. Estas sciate, ke ĝuste en Provenco aperis post la Revolucio la nun tradiciaj "santunoj" (ne PIV-a vorto, signifanta "argila kripstatueto"). Nu, ĉar la patro de *Sylvain* tre ŝatis modli, por plezurigi sian edzinon li decidis krei santunaron.

Poste, al la tradiciaj bovo, azeno, ŝafistoj, li iom post iom aldonis plej diversajn metiistojn, kaj fakte konstruis tutan vilaĝeton, kun preĝejo, ponteto super rivereto, ktp.

Parolante pri la fabelo "*La pastorale*

des santons de Provence", *Sylvain* dume montris siajn santunojn, inter kiuj videblas kamenpurigisto, farbisto, apotekisto, arlekeno, fakiro, kaj eĉ santuno manĝanta haringon! Krome, jam de pluraj jaroj, li aŭ lia patro santunigas por sia Kristnaska vilaĝeto diversajn bonfarintojn kaj bonfarantojn. Tial troviĝas en ilia santunaro unu eta *ZAMENHOF*, unu eta *Cyrano DE BERGERAC*, unu eta *Bécassine*, ...

Post la prelego de *Sylvain* eble okazis (aŭ ne) la lasta miraklo de la Eŭropa Rendevuo: *Edmond PLUTNIAK* tiam disdonis kelkajn t.n. "Bluajn Katojn". Tamen (verŝajne ĉar ili sendis nenium al mi), miaj gespionoj ne konsentis sciigi min, ĉu tiuj ĉokoladaĵoj multoblis sufiĉe, ke ĉiu ĉeestanto ricevu unu el la laŭdire bongustegaj frandajoj...

Jean HENNEBERT

Elkoran dankon al miaj spioninoj *Chantal, Joëlle, Katja, Lucette, Marianne*, kaj al miaj spionoj *Didier, Fabrice, Roland*, kiuj tre utile kaj afable helpis min tute memvole (kaj eĉ senpage!).

El Amieno

Kiel evoluas "Espéranto 80"?

Okazis la 6an de Oktobro 2012 eksterordinara kunveno pri la statutoj de la asocio. Tion tagon la prezidanto *Cyrille DÉCOUTURE* venis kun propono de nova statuto kaj de nova dokumento: la interna regularo de la asocio.

La membrokunveno pridiskutis la aferon, kaj voĉdonis ŝanĝojn en la proponitaj projektoj la 8an de Decembro.

Gravaj ŝanĝoj

Ĉefe estis decidite, ke la kutima estraro ne plu ekzistos. La rolo de la prezidanto ne plu estos unu-persona

tasko, sed ĝi fariĝos plur-persona laŭ modelo de kolektivismo.

Membroj de Esperanto 80, kiuj tion deziras, kaj ne devige ĉiuj, povas fariĝi iel kun-prezidanto, t.e. kolektivo-membro.

Sammaniere, ne plu estos nomumita sekretario kaj ne plu estos nomumita Kasisto. La personoj ne plu ekzistos, sed la taskoj, jes.

La sekretario estos anstataŭita de "La tasko de la sekretario" kaj la kasisto estos anstataŭita de "La tasko de la kasisto". Kiel tio povus funkcii?

Fakte, la taskojn plenumos ĉeestantaj

membroj, laŭbezone kaj laŭkaze. Tio signifas, ke "kun-prezidantoj" subskribos la novan statuton, sed, ke sekretario aŭ kasisto subskribos la dokumentojn.

Laŭ la prefektaj servoj, la kolektiva prezidanteco tute eblas.

Tion telefone asertis al mi oficistino pri asocioj en Prefektejo de Amieno. Tamen, sen "vera" sekretario kaj kasisto, povus esti problemoj. Tion ni scios tre baldaŭ.

Redaktis *Cyrille DÉCOUTURE*

Agad-raporto el Araso

La 3-an de Septembro 2012 okazis en la Arasa Kulturoficejo stranga Esperanto-kurso. Fakte ĉeestis neniu lernanto, nur kvin instruantoj: *Arlette* kaj *Edmond PLUTNIAK*, *Marianne DUNLOP*, *Nicole BÉCANT*, kaj *Jean HENNEBERT*, kiuj laŭvice instruas ĉi-jare Esperanton en Araso, kaj konvenis tiutage por pridiskuti pedagogiajn temojn kaj organizi sian kunlaboradon.

Kelkajn tagojn poste, *Marianne* petis de la lokaj gazetoj, ke ili informu pri nia unua septembra kurso kaj pri la filmo, pere de kiu ni intencis prezenti la internacian lingvon. Ŝi ankaŭ disdonis flugfoliojn ĉe la universitato kaj la flegista lernejo.

Vendredon la 14-an *Edmond* telefonis al mi por anonci, ke li ankoraŭ ne ricevis la DVD-on de la filmo "Esperanto estas...". Kiun *Arlette* antaŭ tri monatoj promesis spektigi okaze de la unua septembra kurso. Li do petis, ke mi registru la sep filmetojn disponeblajn ĉe *YouTube*. Mi kompreneble ne rifuzis plenumi tiun facilegan taskon.

La saman vesperon mi do elŝutis la filmetojn, sed mire konstatis, ke la registritaj dosieroj estas nenormale malgrandaj, kaj tute ne spekteblaj. Rapida serĉo pere de *Google* (cetera nuna posedanto de *YouTube*) evidentigis, ke de apenaŭ kelkaj tagoj *YouTube* malebligis, ke oni elŝutu ĝiajn filmetojn per tiaj kutime efikaj elŝutiloj, kia estas ekzemple *Downloadhelper* en la krozo *Firefox* (alinome *Fajrovulpo*). Iom pli longa serĉado feliĉe sciigis al mi, ke, danke al *html-5* kaj kelkaj taŭgaj agordoj eblas tamen elŝuti la filmetojn laŭ la formato "webM" (kiu mi tute ne konis). Post kelkaj mallertaj provoj la elŝutado fine sukcesis, kaj la registritaj filmetoj perfekte disvolviĝis sur la ekrano de mia komputilo.

Kompreneble mi ne intencis veturigi al Araso mian rapidegan sed

pezegan komputilon: akompanos min nur mia tabuleto, kiu konsentas amike rilati kun la kluba projekciilo. Mi do kopiis la sep dosierojn en mian *iPad*-on, kaj ĉio estis preta por la lunda kurso.

La morgaŭon mi subite demandis min, ĉu la tabuleto vere kapablas spektigi filmetojn registritajn laŭ la formato "webM"... Mi tre baldaŭ konstatis, ke la respondo bedaŭrinde estas nea. Mi do reŝaltis la rapidegan kaj pezegan komputilon, kaj serĉis metodon por ŝanĝi la formaton de la filmetoj. Facilaj metodoj ja abundas, sed rapidan mi ne trovis...

Nu, antaŭ la fino de la tago troviĝis en mia tabuleto sep spekteblaj filmetoj, kaj mi fieregis pro tio, ke danke al mia ŝvitiga laboro *Edmond* povos plenumi la promeson de *Arlette*, t.e. projekcii la filmon "Esperanto estas..."

Lundon la 17-an mi konstatis, ke la programistoj de *Downloadhelper* ĵus sukcesis kontraŭi la novan protekton de *YouTube*, kaj la sep filmetoj denove estis tre facile elŝuteblaj laŭ la kutima formato "flv"! Sekve, mia semajnfina laboro ne plu meritis la Nobelpremiojn por elturniĝemo...

La saman tagon komenciĝis je la 18-a la unua kurso de la lernoĵaro. Ĉeestis dek ok homoj, inter kiuj nur kvar instruantoj, do verŝajne plimalpli dek kvar lernantoj.

Nia prezidanto *Jacky RAMON* bonvenigis nin, gratulis la trapasintojn de la junia KER-ekzameno, kaj anoncis senpagan trinkadon post la fino de la kurso, pro kio ni sendube reelektos lin okaze de la onta voĉdonado.

Kelkajn tagojn antaŭe, la instrua teamo petis, ke ĉiu klubano bonvolu rakonti dum la kurso anekdoton pri siaj somerferioj. Kaj tre plaĉis al ni, ke ĉiuj ĉeestantoj konsentis jen laŭtlegi hejme preparitan tekston, jen rakonti kelkajn memoraĵojn. Partoprenis eĉ nia kara prezidanto, kvankam li videble esperis, ke lia ĵusa parolado sendevigis lin konfesi kelkajn

somerajn sekretojn.

Ĉiuj nun atendis la filmon "Esperanto estas...". Kiam mi fiere anoncis al *Edmond*, ke mi kunportis la sep filmetojn, li eĉ pli fiere anoncis al mi, ke antaŭ kelkaj horoj li ricevis la ĉi-supre menciitan DVD-on! Tial ni bezonis nek mian tabuleton nek miajn sep dosierojn por plenumi la promeson de *Arlette*. Bedaŭrinde, kvankam ni ĉiuj spektis la filmon atenteghe, neniu pufmaizo rekompencis nin...

Vendredon la 21-an fronte al la stacidomo de Araso kelkaj klubanoj partoprenis, okaze de la Internacia Tago de Paco, en la manifestacio organizita de la loka komitato de "Mouvement de la Paix".

Poste okazis nia Arasa kurso ĉiun lundon de la 18-a ĝis la 20-a. Du junuloj informitaj de iu gazeto aŭ de la flugfolioj de *Marianne* vizitis nin, sed ili ne povas ĉeesti niajn kursojn, kaj lernas Esperanton pere de la interreto.

Sekve, ĝis la fino de Oktobro aniĝis neniu novulo kaj malaniĝis neniu malnovulo. Ĉiuj kursoj studas en la sama grupo, sed la amikega etoso tre faciligas la taskon de la instruanto...

Dume Jean HENNEBERT plu instruas du vesperojn ĉiusemajne (krom en Aŭgusto) en la *MJC de Nœux-les-Mines*: tiuj kursoj okazis ĝis la 27-a de Julio, kaj rekomeniĝis la 30-an de Aŭgusto. Ĉeestas ĉi-jare ses kursoj. Krome ok-jara knabo ofte akompanas siajn gepatrojn, kaj aktive praktikas Esperanton dum proksimume tri kvaronhoroj. Post tio ni lasas lin ludi, kio ne malhelpas lin kelkfoje proponi ĝustan respondon, kiam lia patrino tro longe hezitas!

Menciindas, ke la 9-an de Junio unu lernanto kaj unu instruanto de *Nœux-les-Mines* trapasis la tutmondan skriban KER-ekzamenon, kaj cent elcentoj el ili sukcesis!

Kune kun la kluboj de *Oignies* kaj *Nœux-les-Mines*, *Arras-Espéranto* entute kolektis 2111 subskribojn por la peticio “*Espéranto au bac!*”. Pluraj el niaj klubanoj neniam hezitis subskribigi ĝin okaze de kia ajn publika evento. Dankegon al ili pro ilia diligenta persistemo!

Nia retejo:
<http://arras.esperanto-nord.org>

Nia adreso:
Office Culturel
61 Grand'Place
62000 ARRAS.

Esperanto-kursoj
- en Araso: lunde de la 18-a ĝis la 20-a (krom dum ferioj).
- en la *MJC* de *Nœux-les-Mines*: marde kaj vendrede de la 18-a ĝis la 20-a (krom dum Aŭgusto).

Raportis *Jean HENNEBERT*

El Dunkirko

Agad-raporto el Dunkirko



La 19an de Septembro 2012 okazis la informkunveno de *Dunkerque-Espéranto*, en la kutima kunvenoje “*Brossolette*”.

Merkredon la 26an de Septembro rekomenciĝis la Esperanto-kursoj (dufoje monate) por tri veraj komencantoj, kaj ses progresantoj.

De la 20a ĝis la 28a de Oktobro, okaze de “Bildoj”, fotoekspozicio proponita de *Marion VANDERSYPE*, la klubo starigis budon por prezenti la lingvon Esperanto, kaj la agadojn de nia asocio. Sabaton la 20an de Oktobro, okaze de la inaŭguro, *Jacques YVART* esperant-

lingve kantis kelkajn kanzonojn.

La 17an kaj 18an de Novembro, tri klubanoj (*Théodore, Patrick, Xavier*) partoprenis en la 24a Eŭropa Rendevuo de *Stella-Plage*. *Jacques YVART* kantis okaze de la vespera spektaklo, sabaton vespere. La etoso estis tre agrabla.

La 24an de Novembro, *Xavier VILAIN* partoprenis en la kunveno de la Federacia Komitato (*Espéranto-Nord*), en la “*Office Culturel*” en Araso.

Merkredon la 19an de Decembro, la klubanoj kune vespermanĝis en restoracio – en

Dunkirko – okaze de la tradicia *ZAMENHOF*-festoj.

Sabaton la 23an de Marto 2013, nia asocio *Dunkerque-Espéranto* starigos budon en la 9a Salono pri la Lingvoj en la interurba komunumdomo de Dunkirko, proponita de la asocio “*Association pour le développement des langues sur le littoral dunkerquois*” (ADLLD). Ĉirkaŭ 1 500 vizitantoj povos ekkoni la agadojn de la klubo.

Merkredon la 26an de Junio 2013 okazos la 21-a ĝenerala membrokunveno de nia asocio.

Raportas *Xavier VILAIN*

El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

Agad-raporto el Lille

Ĉiusemajnaj Kursoj
Universitato Lille III: ĉirkaŭ kvin lernantoj partoprenas en la ĉi-mardaj kursoj por komencantoj, kaj ĉirkaŭ tri en la lundaj kursoj (dufoje monate) por praktikantoj (instruas *Michel DECHY*).

Kvartala Domo en la centro de Lille: ĉirkaŭ kvar lernantoj partoprenas en la ĉi-marda kurso por komencantoj (instruas *Katja BOEN*).

Bersée: ĉiun lundon okazas kurso por komencintoj ĉar ĉiuj eklernis lastan jaron, do gratulojn al *Claude* kies sep lernantoj plu lernas ĉijare

(instruas *Claude LONGUE-ÉPÉE*).

Prelegoj kaj prezentado de la lingvo Esperanto

Du prelegoj okazis en *Villeneuve d'Ascq* (la 18an de Septembro: 63 virinoj, kiuj atente aŭskultis min..., kia plezuro, ĉu ne?) kaj en Valencieno (la 9an de Oktobro: pli ol 30 atentemaj virinoj + *Jean MACKÉ* kaj *Jean DIETRICH*, kiuj esperis varbi novajn lernantinojn); ĉiufoje mi estis invitita de la sama asocio “*Nord Madame*”, fakte asocio por virinoj en diversaj urboj de la norda regiono.

La 15an de Novembro, dum la tuta mateno, mi prezentis Esperanton al la klaso CM2 de S-ino *COURTIN*, en la lernejo *Paul DUROT* en *Seclin*, kie instruas ankaŭ mia filino *Izabel!*

La Templo de l' Suno
Baldaŭ aperos nova esperanta traduko de Tinĉjo:

La Templo de l' Suno.
Hervé GONIN estas denove la tradukinto.

Raportas *Michel DECHY*

Lasta paĝo de LA TEMPLO DE L' SUNO

La eldonon de ĉi tiu albumo zorgis *Espéranto-France* (Unuiĝo Franca por Esperanto), la franca landa asocio, membro de Universala Esperanto-Asocio.

Denove Tinĉjo parolas Esperanton kiel en la jam eldonitaj albumoj de la famkonata serio "La Aventuroj de Tinĉjo" (24 albumoj tradukitaj al pli ol 80 lingvoj; pli ol 240 milionoj da ekzempleroj jam venditaj



tra la mondo), nome:

- La Krabo kun Oraj Pinĉiloj (1981)
- La Nigra Insulo (1987)
- Tinĉjo en Tibeto (2005)
- La Templo de l' Suno (2012)

La lastaj du estas kortuŝaj himnoj al amikeco. En "Tinĉjo en Tibeto", Tinĉjo frontas ĉiujn danĝerojn en Himalajo por savi sian ĉinan amikon Ĉang, kiu postvivis aviadilajn kraŝojn. En "La Templo de l'

Suno" niaj herooj retrovas Profesoron Sungirul' en Sud-Ameriko dank'al la helpo de kuraĝa indiana amiko Vulpeĉjo.

La projekta kunordiginto *Michel DECHY* varme dankas ĉiujn kontribuintojn al la sukceso de ambaŭ ĉi eldonaĵoj.

Amikeco, toleremo, solidareco inter diversnaciaj homoj: Esperanto nepre celas disvolvi tiujn valorojn tra la mondo. Karaj geamikoj, Tinĉjo deziras al vi plej agrablan legadon!

Reportis *Michel DECHY*

El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

Boatado kun kortrejkanoj (Dimanĉon 30-an de Septembro 2012)

Renkontiĝoj kun niaj flandraj amikoj ĉiam estas granda plezuro, kaj kiam ni alvenis al la rendevuloko apud malnova pumpilejo (bela konstruaĵo kiu nun fariĝis centro por vizitantoj, iuspeca turistinformejo kun interesaj ekspozicioj kaj ĉiuj informoj pri la regiono) ni ĉefe pensis pri agrabla Esperanta posttagmezo, kaj la anoncita boatado ŝajnis esti nur plia malgrava allogaĵo.



Se vi legis la inviton, ankaŭ vi verŝajne pensis pri unu el tiuj kutimaj porturismaj barĝetoj, kiujn oni vidas sur niaj kanaloj. Nu, "nia" boato neniel estis ordinara. Temis pri mirinda *Tjalk* (Tjalko verŝajne, en Esperanto). Ĝi estis konstruita en Nederlando en la jaro 1896 kaj estas nun la plej malnova ankoraŭ uzita boato en la tuta Belgio. Kvankam ĝi similas al plata boato kiel barĝo, ĝi, danke al siaj veloj, kapablas veturi surmare. Ĝia pasinteco estas ja prestiĝa. Ĝia

nuna nomo estas "*De oude Tjalk*", "La malnova Tjalko", sed dum la dua mondmilito ĝi sukcese veturigis fuĝintojn al Anglio kaj de la tiama nederlanda reĝino ricevis medalon kaj la nomon "*Uit nood gedreven*", "Pelita de urĝo". Ni do veturis per historia kulturheredaĵo!



La *Bossuit-Kortrejka* kanalo (ligo inter Liso - Lys en la franca - kaj Skeldo - *Escaut*) estis elkavigita de 1 100 fositaj dum la dekaŭa jarcento kaj ili bezonis tri jarojn por fini la laborigon. Ĝi fluas pli alte ol Liso kaj Skeldo kaj pro tio ĝia kreado postulis konstruadon de 11 kluzoj, de subtera tunelo pli ol 600 metrojn longa, kaj de pumpiloj. Ni veturis sur tiu historie riĉa kanalo kaj elboatiĝis en *Moen*, kie ni vizitis la kafejon de samideano *Lucrèce DECOSTERE*.

La nekutime originala kafejo havas du nomojn, "*Sint Pietershof*" en la nederlanda, kaj "La vasta mondo" en

Esperanto. Ni bedaŭrinde ne multe parolis kun la kafejestrino ĉar la vetero belegis kaj ne nur esperantistoj soifis. Ŝi do havis multon por fari. Ni sidis ekstere kaj ĝuis la etoson antaŭ ol reiri al nia Tjalko. Dum la tuta ir-kaj-revenvojaĝo ni sidis sur la ferdeko kaj pace nin sunumis rigardante la kanalbordojn, iliajn arbojn kaj bestojn.



Plej agrabla vespermanĝo en la restoracio de la malnova pumpila konstruaĵo konkludis tiun ravan posttagmezon. Babilante ni eksciis pri la regiono kaj ĝiaj multaj allogaĵoj, interalie por piedirantoj kaj biciklantoj. Niaj amikoj certe konvinkis nin, ke ne ĉiam necesas veturi tre malproksimen por turismi kaj ke interesaj vindindaĵoj ekzistas ankaŭ je nur kelkdekoj da kilometroj de nia propra regiono.

Reportis *Katja BOEN*

En la medioteko de Bersée estas eble lerni la egalrajtan lingvon

Artikolo aperinta en "La Voix du Nord" de la 9-a de Oktobro 2012



Ĉi tie en la vilaĝo, oni scias kio estas Esperanto. Claude LONGUE-ÉPÉE multe helpas al tio. Ankaŭ lia patro Nestor – iama urbestro de la vilaĝo – multe agadis tiucele.

"Mi estas iom seniluziigita, ĉi vespere, vidi neniun novulon ĉe tiu informkunveno. Sed aliflanke mi ĝojas vidante, ke miaj sep pasintjaraj gelernantoj estas ĉiuj ĉi tie, pretaj por dua jaro de lernado", deklaras Claude LONGUE-ÉPÉE la kursgvidanto de Esperanto.

Ĉiokaze li tiela konatas en Bersée (vilaĝo kun 2200 loĝantoj). Lastan merkredon, li estis organizinta informkunvenon pri Esperanto. Tiun lingvon li rapide ellernis, kiam li estis dudekjara, profitante unujaran ĉes-

igon de lernado pro grava malsano.

"Mi tiam trovis la lernolibrojn pri Esperanto de mia patro, kaj mi tuj pasiigis al tiu lingvo ne kredeble facile lernebla. Dum miaj studoj, mi studis proksimume dum dumil kvincent horoj la anglan lingvon... kaj mi daŭre ne kapablas komprenigi min en tiu lingvo. Male, tuj entuziasmigite de Esperanto, mi ne vidis pasi la tempon kaj, per deko da ĉiutagaj horoj, post du semajnoj, mi sufiĉe flue parolis Esperanton, mi legis romanojn kaj korespondis kun diversaj alilandanoj", asertas tiu "suker-inĝeniero" kia li sin difinas.

Ornitorinko

Claude estas emerito de la firmao "Béghin-Say"... La sukerbetoj – aŭ la sukerkanoj – havas do nenian sekretion por li.

Ankaŭ ne la internaciaj Esperantokongresoj, kiujn li partoprenas. Li tiel estis, kiel prezidanto de "Espéranto-France", unu el la organizantoj en 2005 de la centjariĝo de la unua monda kongreso de 1905 en Bulonĵo-ĉe-Maroo.

Kaj li emfazas, en parolado ne senhumura, la historion de "sia" egalrajta lingvo. Li same emfazas ĝiajn naturajn

radikojn – ja naturaj kiel la betoj kaj kiel la betsukero –, ĝian aglutinecon, ĝian fonetikecon, ĝian muzikecon kaj "ĉefe ĝian grandan faciligon por malfermi al ĉiuj la pordojn de la mondo". Ne provu lin insidi demandante kiel oni diras "ornithorynque" en Esperanto. "Ornitorinko" li tuj senhezite respondas, ĝustigante sian respondo per la dek-kvina gramatika regulo de Esperanto rilatanta la internaciajn radikojn kaj klariganta la adapteblecon de Esperanto al la evoluo de la teknikoj, de la medicino, de la komputiko...

Kaj, ĉar liaj gelernantoj elmontras multe da plezuro sekvi liajn kursojn, ni povos certe nombri sep novajn geesperantistojn fine de la lernoĵaro en Bersée.

La kursoj okazas en la medioteko de Bersée ĉiulunde de la 18-a h. 30 ĝis la 20-a h. 00.

Kontakto : Claude LONGUE-ÉPÉE

Tel. : 03 20 59 28 80

Retadreso : plongueepe@free.fr

Redaktita de Christian FINEZ
por "La Voix du Nord"
Alesperantigita de
Claude LONGUE-ÉPÉE

El Valencieno Agad-raporteto el Valencieno

★⁸⁰ La kursoj en la Domo de Asocioj de Valenciennes okazas :
– 1a grado: ekde la 4a de Oktobro, ĉiun ĵaŭdon je la 10a ĝis la 12a kun tri gelernantoj (gvidanto Jean MACKÉ).
– 2a grado: ekde la 20a de Oktobro, ĉiun sabaton je la 10a ĝis la 12a kun kvar gelernantoj (gvidanto Jean DIETRICH).

★⁸⁰ La 9an de Oktobro, ĉeestis tridek membroj de la asocio "Nord-Madame", al la prelego de Michel DECHY, en la Domo de Asocioj de Valenciennes.
La temo estis "La diversité des langues européennes".

★⁸⁰ Jean DIETRICH partoprenis la 17an kaj 18an de Novembro en la 24a Eŭropa Rendevuo de "Stella-Maris".

Raportis Jean-Marc FRATARD

Vivo de Valencienano: Constant MOYAUX

Constant **MOYAUX** naskiĝis en Anzin la 15an de Junio 1835, ĉe la n° 77 de la aktuala avenuo Anatole **FRANCE**. Lia patro estis modesta lignaĵisto laboranta por la Kompanio de la Minejoj. Li frekventis la komunuman lernejon kaj studis la desegnadon en Valenciano. Malgraŭ promesplenaj rezultoj, liaj gepatroj, ne riĉaj, decidis la ĉeson de la studado kaj volis laborigi lin en la patra metiejo. Liaj profesoroj obtenis la privilegion akcepti lin senpage en la kursejono. Tiam li estis 16jara. La 28an de Septembro 1851, la komunuma konsilantaro aprobis subvencion de sescent frankoj por ke la juna Constant **MOYAUX** povu vizitadi la kursojn de la Belarta Lernejo en Parizo, kien li eniris en Decembro 1852.

Li ekstudis la arkitekturon. En Aprilo 1853, la urbestro laŭtlegis lian leteron anoncanta lian sukceson pri la konkurso de perspektivo. En Septembro 1856, li obtenis la Duan Rompremion kaj en 1861, la Unuan Grandan Premion, pro projekto de termobanejo. La akcepto, kiu al li estis farita, estis grandioza. Triumfarko estis starigita. **THIERS**, kiu tiam estis en Anzin, poste memoris kaj ofte reparolis pri tiu akcepto.

Post restado en la Villa **MEDICIS**, li vizitis Grekion, Sicilion, Konstantinopolon, Venecion kaj revenis en Parizon, kie li estis unu el la kvar

ĝeneralaj inspektoroj de la Servo de la Publikaj Konstruaĵoj. Li estis arkitekto de la Pontoj kaj Vojoj. Li renovigis la kupolon de la Palaco de la Instituto kaj gvidis la konstruadon de la Observatorio en Meudon.



La matrice vers 1950. Arkitekto Constant Moyaux. Elle fut construite
La urbodomo de Anzin.

Ĉe la konkurso organizita por la rekonstruado de la urbodomo de Parizo (detruita en Majo 1871) li akiris la kvaran rangon. Li konstruis la Kontan Kortumon kaj ankaŭ konkursis por la Sankta Koro de Montmartro. La urbodomo de Anzin, kies arkitekto li estis, estis finita en 1874.

En Aŭgusto 1879, la komunuma konsilantaro gratulis lin pro lia nomumigo al la Ordeno de la Honora Legio; li de tiu estis promociita Oficiro en 1880.

Li estis nomumita profesoro de la Belarta Lernejo de Parizo en 1890 kaj elektita membro de la Instituto en 1898.

En Oktobro 1911, li ĉeestis pilkpartion en Valenciano kun alia ano de Anzin, S-ro **JENART**. Li falpaŝis sur tilio-radiko kaj vundis al si la manon. Li estis flegata ĉe apotekisto de la

strato al **Quesnoy**, kaj reiris al Parizo, kie li mortis la 11an de Oktobro 1911 pro tetanoso. La funebraĵo estis celebrita en la preĝejo de Anzin.



Monumento estis starigita honore al li en Anzin, ĉe la placo de la malnova urbodomo (Placo Constant **MOYAUX**).

Constant **MOYAUX** ankaŭ estis mirinda desegnistoj kaj akvarelisto. Lia malavareco estis de ĉiuj agnoskita. Ne edzigita, li testamentis al sia denaska urbo sian bibliotekon, kiun oni povas konsulti ĉe la Municipa Biblioteko, kaj al la kadukulejo, sian riĉaĵon.

Eltraĵo de la libro de S-ro Jean-Claude **MOUYS**:
"HISTOIRE D'ANZIN"
Tradukis Jean **DIETRICH**

Granda vojaĝo

Tag-libro pri Ĉinio (tria parto)

Manko de komforto, de pureco, de higieno

Tie kuŝas la malforto de nia restado, kaj multfoje ni havis nostalgion pri nia hejmo pura kaj komforta!!...

La hotelo, tion mi jam menciis,

estas iamaniere apenaŭ loĝebla. Nia ĉambro estas sufiĉe taŭga kompare al iuj aliaj. La manko de bona tenado kaj la humida klimato ŝimigadas ĉion, la murojn, la plafonojn; eĉ la puraj teksaĵoj, kiujn ni surmetis mal-

ENHAVO

NIAJ MEMBROJ VERKANTAS

- ★ Staĝo en Ĉinio (tria parto) p14
- ★ La plej belaj okazaĵoj pri birdoj (unua parto) p17
- ★ Vizito de la Muzeo de la Hospitalo Saint-Roch en Issoudun – Ĉambro 4 p21
- ★ Samseksemo kaj kunligiĝo p22

bonodoras. Ne eblas lavi ion ajn, nenio vere sekigiĝas, kaj en la urbo ekzistas neniu teksajlavejo. Estas nur vestpurigejoj, kie oni devas atendi pli ol tri tagojn, por repreni siajn aĵojn. Mi lavigis nur la tegon de la litkusenego, kiun mi havis bonan ideon alporti elhejme (tiu tego entenas la malgrandajn mizerajn litkusenajn kovrantajn nian liton kaj alportas al ni tiun sensaĵon de niahejma mildeco). Ankaŭ la du pijamoj de mi kunportitaj malbonodoraciĝas kaj mi aĉetis novajn pijamojn, po unu por ĉiu el ni, por fini nian restadon.

Antaŭ deko da tagoj, periodo de kolerkrizo kaj de misestado kaptis nin ĉiujn: ne plu estis varma akvo en la hotelo, svarmis musoj (feliĉe ĝis nun ne jam en nia ĉambro). La litukoj kaj la lavtukoj estas malofte ŝanĝitaj. Ni plendis, ni protestis, ni postulis. Sed ni konscias, ke ni ĉagrenas la lokajn organizantojn. Ĉiu ekbaraktis por plibonigi nian komforton: interalie per aĉeto de pelvegoj por enmeti varman akvon (ni ĉiuj bonŝansas havi elektran bolkrucŝon en niaj ĉambroj, ne senutila lukso ĉar ni devas konsumi nur boligitan akvon); ankaŭ per aĉeto de spongoj, de brosoj por necesejo, de lavtukoj.

Kial varma akvo ne estas havebla? La ricevitaĵ klarigoj estas ne klaraj: la akvo estas varmigitaj per sunradikaptiloj, dum la nuna vintro estas malmulte sunumata. Ni pli poste eksciis, ke paneas la dika elektra akvovarmigilo, kiu devus kompletigi aŭ anstataŭi la sunilaron. La hotel-estrino ĝin riparigos post tiu periodo de protestado; nun estas solvita la problemoj, kvankam ankoraŭ hodiaŭ, la 8-an de Februaro, panelo sciigas denovan paneon PROVIZORAN (??) de la produktilaro de varma akvo...

La mastrumado estas ĉiutage farita laŭ la ĉina metodo: por lavi la banĉambron, la ĉambrestino akvumas la plankon per la duŝilo kaj lasas la akvon mem sekigi; la planko de la ĉambro estas akvumita (ne temas pri vera lavado) pere de malseka balailo ege malpura; la tuto daŭras 45 sekundojn! Mi elturniĝas per la

viŝtukoj, nun ĉiutage ŝanĝitaj: tiuj ĵus uzitaj por niaj korpoj utilas por sekigi la plankon!!...

La ĉinaj esperantistaj organizantoj ekkonscias pri tiu kultura malsimilo. Ili imagis, ke nur la hotelkosto gravas; ili ne imagis, ke por ni Eŭropanoj ankaŭ same gravas la komforto kaj la pureco. Ni konscias, ke niaj kulturoj malsamas kaj ni ne volas plie ĉagreni ilin; ni ambaŭflanke eltrovis la necesan kompromison, kaj la postsekvo de la restado estos pli serena kaj pli "komforta".

La stratoj estas malpuraj: ĉio estas surteroj forĵetitaj; la infanoj fekas senpudore sur la stratoj antaŭ la popolo; la plej junaj eĉ surmetas pantalonojn malantaŭe malfermitajn, sen subaj kalsonoj, por povi kaŭri ne demetinte ilin kiam ili tion bezonas...

Tamen ĉio estas purigita (ne tre bone ĉar ne lavita, sed balaita). Tio estas laboro por sinjorinoj, tre junaj aŭ malpli junaj. Ili pasigas la tempon kun balailoj, polvositeloj, kaj ĉaretoj en kiuj amasiĝas ĉiuj malpuraĵoj de la ŝoseoj kaj de la trotuaroj. Danke al ili matene la trotuaroj estas "puraj". Ili certe laboras dum la plej longa parto de la nokto. Imagu, ke la aera humideco tre rapide ĉion kotigas, kaj ankaŭ niaj ŝuoj tre rapide difektiĝas. Pri tio ankaŭ sinjorinoj, ofte maljunaj, ofertas siajn servojn; sidante sur malalta tabureto, ili purigas kaj riparas ŝuojn dum la tuta tago. *Edmond* cirigas siajn ŝuojn koste de du "yuans" (t.e. 0,25 €).

La medicino, la flegado, la masaĝoj

Ĉiuj ŝojas la famkonatecon de la ĉina medicino. La ĉinoj ĝenerale prizorgas sian korpon, praktikante, ĉu la "ŝi-kong", ĉu la "Taj-ŝi". La praktikado de tiuj luktosportoj plej ofte okazas en la parkoj; tial ke ni loĝas en la urbocentro, ni malkovras ilin nur dum niaj ekskursoj. Tamen, sur la trotuaro antaŭ nia hotelo, malfrue vespere, estas grupo praktikanta ilin laŭ muziko kaj kun granda sinkoncentro; estas sentebla, ke iu majstro talente gvidas tion. Tio ekvalentas niajn

ENHAVO

ANIAJ MEMBROJ VERKANTAS

- ★ **Evoluo de la listo de la membraro** p22
- ★ **Mallongaĵoj** p23
- ★ **Atentigo de la redaktoro** p24

praktikado de la starpozicioj imagu, ke ili disvolviĝas sur trotuaro en la centro de urbego meze de la ĉirkaŭa popolsvarmo.

Koncerne min (*Arlette*), mi eksperimentas la ĉinajn masaĝojn. Preskaŭ ĉiuvespere ĉina esperantisto, kiu estas masaĝisto en hospitalo, venas en nian hotelon post sia labor-tago por havi plezuron renkonti esperantistojn; li ne tre bone parolas, des pli ke li misplaymanieras, sed ni sukcesas interkompreniĝi kaj ni sentas lin ege feliĉa paroli kun ni. Pluraj el ni demandas lin, ĉu li bonvolus nin masaĝi. Li entuziasme konsentas; kaj kiam ni demandas kiam ni ŝuldas, kiel kutime ni ricevas energian rifuzon, li ne konsentas ricevi nian monon. Ni alimaniere pripagos lin fine de nia restado; certe aĉetante por li Esperantajn librojn, ĉar iu ĉina organizanto instalas libroservon en sia ĉambro.

Persone ĝis hodiaŭ mi ricevis tri seancojn de ĉina masaĝo: ĉiu el ili daŭras unu HORON! Ja dum unu horo via korpo estas pistomiksata, knedata, palpata, rulata... **PROFUNDE!** Estas lokoj, kiuj tre suferigas min. Mi kredas, ke mi sufiĉe bone elportas doloron, sukcesante malstreĉiĝi; sed iuj personoj kelkfoje eĉ krias kaj ploras pro doloro... *Margaret* diras, ke tiaj masaĝoj tiel suferigas ŝin kiel akuŝado; ŝi eĉ havas kelkfoje grandegajn bluaĵojn.

Persone mi havis tre mildajn tiajn bluaĵojn! Vi divenas, ke *Edmond* ne volis eksperimenti tian turmentegon!... Estas vere, ke ties intenso kaj daŭro ne emigas al ĉiutaga masaĝo. Krome oni bone sentas, ke la korpo bezonas mem "digesti" tiun masaĝon dum pluraj postaj tagoj de ripozo;

des pli ke la efikoj de tiuj profundaj masaĝoj estas prisentitaj dum pluraj sekvaj tagoj; la tuta korpo laboris kaj ĝia sensiteco intensas. Dume, mi estas konvinkita pri la kuracpovo, kaj eĉ pri la resanigpovo de tiuj zorgoj. La tuta energio, kiu povus blokiĝi en iuj korpopartoj, denove ekremoviĝas; oni sensadas tiun varmon de la cirkulado, tiom ke estas malfacile dormi post tiela masaĝo pro plenpleno de energio...

Margaret eksperimentas la ĉinan kuracarton. Ĉar ŝi havas problemon de abundeco de nazmuko, kiu igis ŝin perdi sian flarkapablon de kvin jaroj, parolinte pri tio al nia masaĝisto de la hospitalo, ŝi renkontas ĉiumatene iun nadlopunkturiston, kiu komplete prizorgas ŝin. Mi lasu ŝin klarigi la terapion de ŝi ricevitajn en la ĉi-sekva paragrafo...

Jam de longe mi scias, ke la kuracoj per nadlopunkturo estas fame konataj en Ĉinio. Ne plu havante flarsenson de kelkaj jaroj kaj daŭre ĝenate de troo da muko en la gorĝo, mi emis profiti mian restadon en Ĉinio, por provi la ĉinan terapion. En la hotelo mi renkontas esperantiston, masaĝiston, kiu profunde masaĝas min: dolorigas la masaĝoj lasante bluaĵojn sur la korpo. Li estas tre kompetenta, tre afabla, li diras al mi, ke li laboras en la hospitalo de Haikou, kaj ke en tiu hospitalo estas tre bonaj nadlopunkturistoj. Mi decidis provi tion.

Neĝeta (tre afabla esperantistino), aŭskultinte min rakonti miajn sanproblemojn, bonvolas akompani min al la hospitalo, por esti mia tradukantino. Ni veturas per taksiaŭtomobilo; mi konfesas, ke mi iom timas, sed Neĝeta trankviligas min. La hospitalo estas tre granda, tre moderna, tre pura. Kvar junaj flegistinoj akceptas la pacientojn en la enirejo kaj ilin gvidas al la fleĝejo; kiel alilandanino mi estas insiste rigardata kun ridoj. La kuracisto atendas min kun kvar flegistinoj. Mi sentas, ke mia pulso akceliĝas. Neĝeta klarigas miajn problemojn al la kuracisto, ĉi-tiu

starigas kelkajn demandojn kaj sciigas al mi, ke li efektive povas min kuraci, se ne redoni al mi la flarsenson, certe solvi mian problemon pri troo da muko.

Mi kuŝiĝas, la kuracisto, pli ol kvardekjara, estas malgranda, li pikas longajn nadlojn en la vizaĝon, la manojn kaj la piedojn. Tio iom suferigas min, sed elportebblas. Iu flegistino interligas la nadlojn per elektrodrato kaj iom post iom ŝi intensiigas ilin. Ne estas agrable, ĉe ĉiu nadlo mi sensas miajn korpulsojn. Iam mi sciigas, pere de Neĝeta, ke la tensio tro fortas, oni tuj malplialtigas ĝin, mi malstreĉiĝas, ĉiu estas vere afabla al mi! La afero daŭras kvardek kvin minutojn. Eltirinte la nadlojn, flegistino masaĝas mian kapon kaj mian vizaĝon. Ŝi forte premas la pikitajn punktojn, kelkfoje mi streĉiĝas kaj ŝi mildigas la premon. Tiu masaĝo daŭras dudek minutojn.

La kuracisto preskribas kuracadon per plantoj, kiujn mi aĉetas en la hospitala apoteko: dek ses saketojn da pulvorigitaj plantoj, kiujn mi trinku en varma akvo ĉiumatene kaj ĉiuvespere. Mi pagas por dek seancoj, nun mi estas engaĝiĝinta!!...

La duan tagon mi ricevas la saman kuracadon, sed anstataŭ la masaĝo de la vizaĝo, ĉar mi sciigis, ke mi multe ĝenatas pro jukoj, la kuracisto proponas al mi purigadon de mia tuta korpo, metonte kupojn sur mian dorson. Kiam li montras mian dorson en spegulo, min angorigas la vido de multaj rondaj makuloj ruĝaj-violkoloraj. Neĝeta ridas kaj trankviligas min dirante, ke tio bonsignas kaj ke post tri tagoj la makuloj estos malaperintaj.

Ĉiutage mi estas akceptita je la sama horo, neniam mi devis atendi!...

La kuracisto neniam laboras sabate. Sed, por ke mi havu miajn dek sinsekvajn tagojn de kuracado, li escepte venas por mi ĉi-sabate; ne estas flegistino. Li laboras en sia kostumo, li persone metas la pinglojn, krom aliaj pliaj sur la dorson (ĉar li rimarkis, ke mi havas dolorojn

ĉe la dorso kiam mi moviĝas).

Li klarigas, ke en Ĉinio oni flegas ne nur la korpoparton, kiu ŝajnas malsana, sed ke oni konsideras la tutan korpon. Ĉar ni estas solaj kun Neĝeta, mi demandas, ĉu li konsentas, ke ni fotografos lin dum mia kuracado. Li konsentas, sed surmetas blankan kitelon por la foto. Li tre longe parolas kun Neĝeta kaj li interesiĝas pri Esperanto.

La sekvantaj tagojn mi ricevas la saman kuracadon, escepte ke la pingloj estas pikitaj sur aliajn partojn de mia korpo. Tiu kuracado ne estas agrabla sed estas elportebla, kaj mi volas kredi, ke tio povos helpi min. La saketoj da plantoj de mi ĉiutage trinkitaj ne estas tre bongustaj, sed ankoraŭ ĉi-foje mi volas kredi ilin efikaj!...

Niaj ĝeneralaj impresoj

Finiĝas nia restado, restas kvar tagoj. Ni pli kaj pli pensas pri nia reveno. Ni scias, ke ĝi estos malfacila, ĉar la plej mallongdaŭra flugado de ni antaŭplanita ne povos okazi. Ni devos foriri el Haikou la dimanĉon 12-an ĉirkaŭ la 19-a horo. Ni enaviadiliĝos por Shengen norde de Hong-Kongo je la 22-a horo. Je la 23-a h.30 (post 1 horo kaj duono de flugado) ni alvenos en Shengen, kaj tie ni devos tranokti en la flughaveno, nia aviadilo por Pekino ja ne elteriĝos antaŭ la morgaŭa mateno je la 8-a horo... Sed nun ni pretas ĉion elporti!...

Por fini tiun raporton, mi volus resumi niajn ĝeneralajn impresojn pri niaj tieaj spertoj. Ĉinio estas lando de ekstremaj kontrastoj: mizero kaj moderneco, malpureco kaj luksego, disciplino kaj malsevero, malriĉeco kaj riĉeco...

Ni konas nur la *Hajnan*-insulon, sed ni parolis kun multaj ĉinaj esperantistoj de aliaj regionoj, tiuj diritaj kriterioj estas veraj en la tuta lando. La aspekto pri mizero, malpureco, malriĉeco estas pli grava ĉi-tie ol aliloke. Ni feliĉas en nia komforto de Eŭropanoj, ni devus ĉesi plendi! Ni ekzemple eksciis, ke Ĉinio estas duonigita (Nordo/Sudo) de la Flava Rivero. La leĝo postulas, ke sude

de tiu riverego estu antaŭvidata en la konstruaĵoj neniu hejta rimedo.

Nuntempe dumvintre, ĉe Neĝeta kaj *Michel*, la temperaturo estas – 5°C. Ĉar ili loĝas en la zono kie normale oni ne hejtas, estas tiel, se ne pli, malvarme interne kiel ekstere! Neĝeta estas instruistino, ŝia lernejo estas neniam hejtata, ĉiu laboras en mantelo kaj la lernantoj havas siajn manojn blugitajn de la malvarmo... Ĉe ni, se estus nur unu tago sen hejtado, ekiĝus tiu revolucio!!...

Sed la ĉinoj estas pli ol mirindaj, afablaj, amemaj, servemaj, amindaj, kuraĝaj, solidaraj. Ni teksis kun ili neforgeseblajn ligilojn, ĉefe kun niaj junaj studantoj, kiuj forgesigas nin pri

la malpuro, la komfortmanko, la nebona vetero plej ofte humida kaj sensuna.



Tamen ni ĝojas forlasi tiun landon. Ni ne kredas, ke ni emos reveni ĉi-tien; ni estas tro burĝiĝintaj! Ni retrovos ĉe ni higienon, purecon, komforton... Sed ni ne retrovos tiujn intensajn

sentojn de solidareco, de amo, de korinklino. Eĉ se ni amas nin reciproke, en familio, inter amikoj, ni vivas ĉefe en la individueco kaj la "ĉiu-por-si-emo"!

Edmond revas, li diras al mi: "Reveninte, ni manĝos frititajn terpomojn, bifstekon, salaton kaj bonan 'Camembert'." Li tre malfacile englutas sian ĉiutagan rizon! Estas amuze: mi ĵus parolis kun *Daniel* kaj *Josiane*... *Daniel* havas samajn dezirojn al frititaj terpomoj, bifsteko, salato kaj ... fromaĝo..."

Verkita de **Arlette PLUTNIAK**
Februaro 2012

HIMNO DE ESPERANTO – INSULO Hajnano, 2012 – 01/11 – 02/12

*Nun estiĝas nia revo en Hajnano la Insulo.
Zime-zum, zime-zum, la insulo, bum, bum, bum.*

*Sed al ni mankas la suno – ne baniĝos ni en maro.
Zime-zum, zime-zum, en la maro, bum, bum, bum.*

*Varma akvo estos ĝuo, pura ĉambro, kaj littuko.
Zime-zum, zime-zum, kaj littuko, bum, bum, bum.*

*Dum la nokto neniu dorm' pro petardoj kaj eksplodo.
Zime-zum, zime-zum, kaj eksplodo, bum, bum, bum.*

*Ĉiu-tage estas rizo, rizo, rizo, krome ovo.
Zime-zum, zime-zum, krome ovo, bum, bum, bum.*

*Sed abundas la fruktaro, dolĉa, gusta, bona frukto.
Zime-zum, zime-zum, bona frukto, bum, bum, bum.*

*Tamen ne mankas laboro, metodo pri instruado.
Zime-zum, zime-zum, la instruo, bum, bum, bum.*

*En ĉambro neniu muŝo pro Dennis kaj sinjor' Nopo.
Zime-zum, zime-zum, sinjor' Nopo, bum, bum, bum.*

*Kun Katalin dum la kurso ĉiuj lernas kun plezuro.
Zime-zum, zime-zum, kun plezuro, bum, bum, bum.*

*Kun Ron vivu monda paco do pereu la milito.
Zime-zum, zime-zum, la milito, bum, bum, bum.*

*Pliboniĝu nia menso per mapo de Federiko.
Zime-zum, zime-zum, Federiko, bum, bum, bum.*

*Dankas ni pro organizo al Trezoro, Arko, Trigo.
Zime-zum, zime-zum, Arko, Trigo, bum, bum, bum.*

*Penny, Jano kaj Karilo helpis multe en la kurso.
Zime-zum, zim-zum, en la kurso, bum, bum, bum.*

*Sen Sinjor' Wu kaj Hosemo, ne funkcius la PROJEKTO.
Zime-zum, zime-zum, la PROJEKTO, bum, bum, bum.*

*Spado nia ĉicerono, gvidis niajn busekskursojn.
Zime-zum, zime-zum, busekskursojn, bum, bum, bum.*

*Ja vivis ni en feliĉo, en granda rond' -familio.
Zime-zum, zime-zum, rond' -famili' bum, bum, bum.*

Traduko pri naturo

La plej belaj okazaĵoj pri birdoj (unua parto)

PRESENTOTEKSTO (verkita de la tradukanto)

Elian-J. FINBERT estas franco naskiĝinta en 1896 en Egiptio. Li iĝis beletristo, kiu verkis ĉiuspecajn librojn, romanojn, memuarojn pri spertoj de sia travivaĵriĉa vivo, kiel kamelisto en Saharo aŭ paŝtisto en Provencaj Alpoj. Li verkis ankaŭ proverbarojn el multaj popoloj. Li ĉefe iĝis konata dum la jaroj 1950-aj pro sia serio da libroj, radioelsendoj

kaj revuartikoloj pri "La plej belaj rakontoj pri bestoj".

Ĉar tiuj libroj kaj artikoloj estis verkita en la jaroj 1950-aj – tio estas kiam la stampo de la karteziaj antaŭjuĝoj pri bestoj kaj la dogmo de esenca muro inter ĉi tiuj kaj homoj estis ankoraŭ forta; ankaŭ kiam la agnosko por la bestoj pri iu formo de inteligento kaj de konscienco de sia esto, pri sentoj kaj emocioj, aspektis

kiel herezo, aŭ estis forĵetita kiel naiva afekta sentemo aŭ antropomorfismo – *Elian FINBERT* en siaj verkaĵoj tre malaplombe, preskaŭ pardonpete, sugestis, ke la mirindaj elstare "homecaj" sintenoj, evidentigitaj en iuj okazaĵoj rakontitaj, ne estas klarigebblaj per la nura tiam ideologie deviga vorto "instinkto", dum tio aspektas tiom klare evidenta, se oni nur legas tiujn atestaĵojn. Sed la aro de tiuj okazaĵoj,

kvankam ne sciencaj eksperimentoj, sed rakontoj trovitaj en gazetoj, raportitaj de atestantoj, aŭ de la raportanto mem travivitaj, konsistigas valoregan dokumentaron por la studo kaj la pripenso pri la kapabloj intelektaj aŭ la sentoj kaj diversaj emocioj evidentaĵe de besto. Kaj oni malpravus flankenlasi ilin, ĉar oni ĉiam kaj denove senigus sin de amaso da valoraj faktoj. Kiel diris *Rupert SHELDRAKE* en sia libro "Tiuĵ hundoj, kiuj atendas sian mastron": "La sumo de la akiritaj konoj far la diversaj bestoposedantoj pri la besta konduto ĝenerale rigardatas kiel anekdota; ĝi estas tial flankenlasita de formala scienco", kaj ĝi restas tiel ne utiligita, sed tia "perdo" riskas igi ĝin pasi preter gravaj faktoj.

Unu el tiuj libroj estis "Plej belaj okazaĵoj pri birdoj", eldonita en 1957.

Mi esperantigis kelkajn rakontojn el tiu libro 332-paĝa.

Jen ili, kelkaj estas malgajaj, eĉ kruelaj.

Kelkaj montras, ke birdoj foje ja scias, kio estas malespero pro morto, kaj kapablas sin konduki trafe dum ĉagreno, tiel instruante lecionon por homoj...

Roland PLATTEAU

CIKONIO – Rakonto n° 36 p. 63-67

Mia amikeco al tiu legenda birdo, kun flugiloj el neĝo borderitaj per la nokto, devenas de mia infanaĝo, infanaĝo parte pasigita en Nilo-valo, kie tiu birdo travintras. Tiun amikecon ne naskis la granda mistero pri ties malsuprenigo de l'ĉielo kun ĉe la beko pendantaj beboj, kiujn ĝi alportas sur la teron. Tiu amikeco ankaŭ ne estiĝis, kiel skribis *ANDERSEN*, "ĉar *Peter* festas Kristnaskon en Egiptio, kaj ĉar ĝi parolas la egiptan lingvon, ĉar tio estas la lingvo, kiun ĝia patrino instruis al ĝi"... dum ne estas egipta lingvo! Sed tiu amikeco ja ekokazis iam, dum mi troviĝis sur la teraso de nia domo, kie mia pasio pri kajtoj ĉiam allogis min, kaj kiam majesta cikoniara flugado pasis super mi, kun streĉitaj koloj kaj ŝvebaj flugiloj. Kaj tiam unu inter la birdoj subite disiĝis el la bando,

implikiĝis – se tiel diri taŭgas – en siaj plumoj, turniĝadis en la ĉielo kaj, blanka kaj nigra maso, falegis kaj surteriĝis ĉe miajn piedojn. Mi estis kompreneble timigita, sed samtempe ekzaltita de tiu aera vidaĵo, kaj de la cikonio, kiu klopodis remeti sin sur siajn piedojn, kaj finfine sukcesis. Mi tiam forlasis mian kajton, kaj rapidege iris serĉi savhelpon.

Mi jam iom konis tian birdon, ĝin sekvinte malantaŭ la plugilo aŭ la ŝpato de iu fellah-o en kampo, dum ĝi ekkaptis jen koleopteron, jen larvon, bufon, muson, aŭ marĉbordan ranon.

Mi do kunportis dishakitan viandon, kaj ĝin donacis al mia bela birdo, kiu okulumis al mi per sia nigra tiom inteligenta okulo, kvazaŭ plidesegnita de du strekoj el *kohl*, sed kiu nur post multe da tempo konsentis proksimiĝi. Videble ĝi certe estis vundita, tamen vidis mi neniam da sangospuro. Nia ĝardenisto, spertulo, alveninte, sciigis min, ke cikonioj, pro tiom longa restado en malsekaj terenoj kaj tiom ofta tretado en malprofundaj marĉoj, finfine maljuniĝante iĝadas reŭmatemaj, tiel, kiel la homoj. Mi neniam povis kontroli la verecon de tiu diagnozo, sed tiam ĝi sufiĉis al mi, kaj mi decidis, kunligiĝi al tiu birdo, flegi ĝin, kaj resanigi ĝin. Ĝi fariĝis la konstanta gasto de la teraso, kie ĝi jen senmoviĝantis dum longaj horoj sur unu piedo, kun pripensa kaj solena mieno, aŭ jen marŝadis, ĵetante siajn krurojn antaŭen laŭ larĝaj egalaj paŝoj, rigardante la ĉielon kun la kolo streĉita. Ekde kiam ĝi ekvidis min, ĝi venis al mi, kaj mi malĝoĵiĝis kaj humiliĝis pro mia nekompreno de la seka kaj ripetata bruo de ĝiaj beklakadoj, kiuj konjekteble esprimis la intimajn pensojn de ĝia malĝoĵiginta koro. Por plaĉi al ĝi mi rezignis flugigi mian rozkal-verd-koloran kajton, ĉar tiu ludilo al ĝi simila timigis ĝin.

Mi ofte iris viziti ĝin, kaj mi estis certa, ke ĝi atendas min ĉiutage, eĉ pli, je ĉiu horo de l' tago. Ĝi plej facile rekonis miajn paŝojn, kiam mi supreniris la ŝtuparon po du ŝtupoj kune, ĉar mi trovis ĝin tie postenanta ĉe la pordo alterasa, kun ĝiaj intens-

rigardaj okuloj, lertaj kaj sagacaj, kun ĝia svelta flugmaŝina korpo kaj ĝiaj nigrelakitaj flugiloj brilaj kaj bonorde refaldigitaj. Mi pensas, ke longajn momentojn ni pasigis unu apud la alia, iom dormetante, meze de la ega varmo. Sterniĝinte sur la kahelojn, mi vekigiĝis kun, apud mi, kun flugiloj ŝirme malfalditaj, la cikonio atenta kaj patrineca, rigardanta al mi varteme... Kiel mi divenis, pro ĝia zorgema mieno.

Mi iradis sur kampoj serĉi por ĝi lokustojn, kaj ĉe la lagetoj kapti ran-ojn por ĝi. Kiam mi malĉeestis tro longtempe, ĝi ne malsciis, ke tio estas ĉar mi estas serĉanta ĝian nutron; kaj mi trovis ĝin malsupre de la ŝtuparo, kiun ĝi estis lerninta sobpaŝi kaj sorgrimpi per skuaj paŝoj. Eĉ antaŭ ol mi alvenis sur la teraso, ĝi jam serĉfosadis en mia flanksako per sia longa, akra kaj malmola beko, kiu eklutis la bestetojn avide.

Okazis tio, kio estis okazonta, sed antaŭvidi tion estis for de mia penso. En mia infanmenso, la cikonio estis por ĉiam ligita al nia domo, kiel feliĉportanta amuleto. Ĝi estis mia amiko tiel, kiel mi estis ĝia amiko. Iun matenon mi trovis la terason malplena. Mi tuj komprenis, ke estinte refortigiĝinta, kaj perdinte siajn reŭmatismojn, ĝi estis ekfluginta al la ĉielo.

Tio estis laŭ mi tiel, kiel perfido, kaj tio estis en mia vivo ankaŭ mia unua aflikto. Vane mi rigardegis al la lazura ĉielo, kie krozis milvoj, kie turniĝadis la kolombaroj. En la kampoj, ĉe borde de Nilo kaj ĉe la lagetoj mi restadis longe, kaj gvtatis la cikoniojn, sed nenie mi trovis la mian, kiun mi estus rekoninta inter mil.

Mi reekludis per la kajto, ĝin mi flugigis alten kaj foren, pensante, ke eble la birdo ĝin rekonos, kaj revenos, kiel al kuniĝsigno.

Kaj poste la sablo de la tempo fluis, fluadis. Sed la teraso tamen plu restis mia havenloko, mia plej ŝatata tereno, kie jam la soleco estis mia mistera aliancinto, des pli ke, kaŝe kaj obtuze mi atendis, ke la cikonio revenos. Kaj jen fakte ĝi revenis en la sekvanta Septembro, tempo kiam la frukto-

kvastoj de niaj daktilarboj en ĝardeno komencis maturigi siajn sukcenkolorajn fruktojn.

En la ŝtuparo mi aŭdis sistrajn brudojn, kiujn mi tuj rekonis. Mi impetis. Jen estis ĝi. Ĝi ne estis forgesinta min. Ĝi plu aspektis kiel antikva solena maljuna malvulara sinjorino, kaj ĝi ekgrakadis, milde tirante la kolon malantaŭen kaj antaŭen, dume malfaldante siajn ravajn ĉefplumojn. Parolis ĝi al mi, flustris ĝi al mi – se tiel diri taŭgas – pri aferoj de nur si kompreneblaj. Kaj jen kiam mi atingis la terason, mi blindiĝis pro miro: ĝi estis superŝutita de cikonioj. Ĉiuj, min ekvidinte, fluge leviĝis kaj poste remetiĝis ĉien, silentaj, kun siaj flugiloj pretaj, timante kaj samtempe fidante, ĉiuj salutante per turniĝoj de siaj longaj koloj, laŭmaniere de koranaj deklamistoj.

Mi, la infano, estis privivanta legendon, legendon kiu iĝis realaĵo. Fabelmondo eksturmintis mian vivon. Tio estis tia, kia inica sakramento.

Mi scias, ke tamen tio ne povas daŭri, ke tiu unika momento estas dia favoro. Ekstis en la aro de nigraj kaj blankaj plumoj ordonvorto, kiu flugis de birdo al birdo. Kaj subite tumulto de flugiloj kaj de makzeloj ekaŭdiĝis. Mi estis surdigata. Mi vidis sin levi la altaj purpurgantitaj kruroj, kiuj surfaldiĝis dummomente sub la vostoj tiel, kiel la surteriĝa ekipaĵo de aviadiloj; kaj kiuj poste fariĝis pendantaj. Kaj jen la amaso alten flugimpetis, vojiris cirklojn, ŝvebis, malkovrinte la sorigantajn aerfluojn, kaj malaperis el vido en la egipta diamante malmola helego.

Kompreneble, mia cikonio sekvis la aron, sed dum tempeto, pli forpasema ol fulmo, en mia kredema fidema animo, mi kredis, ke ĝi revenintis por neniam plu min forlasi. Kaj krom la unua ĉagreno, kiu al mi alvenis el ĝi, aldoniĝis dua ĉagreno pli dolora. Dume, la fakto, ke la preterpasanta birdo memoris pri mi kaj pri mia hejmo, kie mi estis ĝin akceptinta, nutrinta, fleginta, la fakto ke por ties zorgo mi estis oferinta mian sveltan kajton, ĉio tio iĝis min ĝin respektegi.

Tri sinsekvajn jarojn ĝi revenis kun-

portante al mi mesaĝon de sia amik-eco; ĉiufoje en la tempo, kiam turtoj flugadis supre de l' daktilujoj de nia ĝardeno, meze de la ruĝaj grapoj da mielecaj fruktoj.

Poste ankaŭ mi obeis la migradojn de mia destino, je iroj kaj revenoj misteraj tra la mondo.

Sed mia penso plu konservas stampo-
on de la pasado de l' stilzobirdo en mia infanvivo, en la vivo de tiu infano, kiu mi neniam ĉesis esti, iom flugila, iom grunda, portanta en mi la hieroglifan signifon de cikonio, kies senco estas "kompato".

GAROLO – Rakonto n° 79 p. 124

Du garoloj vivis libere en kaĝo, kien ili enflugis ĉiuvespere pasiginte la tagon en arbaroj.

Ilia mastro, kiu estis vartinta ilin, ilin kaptinte el ilia nesto, estis al ili forte korligitaj; kaj ankaŭ la birdoj same al li, ĉar ili ne povis malhavi lin. Ili ja povus resti meze de arboj kaj esti liberaj, sed ili revenis hejmen, en sian malfermitan kaĝon tiel, kiel en propran neston.

Sed, iun tagon ilia mastro mortis. La garoloj, ne plu vidante lin, serĉadis lin en ĉiuj ĉambroj de la domo; kaj poste ili restadis en sia kaĝo, rifuzante elflugi el ĝi tiel, kiel ili kutimis fari ĉi-matene; ili kadukiĝis, kaj iun tagon oni vidis unu el ili surbati per la krani-o la kaĝstangojn tiom impete, ke ĝi mortis en la nokto. Ĝia kunulo, ina birdo, baldaŭ imitis ĝin, kaj mortis sammaniere, du tagojn poste.

GRUO – Rakonto n° 81 p. 128

Gruoj estas birdoj tre sociemaj, kiuj interrilatas ege bone, ne nur kun siaj samgentuloj, sed ankaŭ kun plej multe da akvo-birdoj. Mi povis de proksime observi iun gruan en Israelo, sur la bordoj de la lago *Huleh*, kie tiu specio abundas, samtempe kiel aliaj migradbirdoj.

Ties singardo estas mirinda, tiom kiom ties inteligento. Ĝi ekkonsciigas tuj pri la kondiĉoj novaj kaj neatenditaj, en kiuj ĝi troviĝas, kaj ĝi agas konsekvence, ĉiam ekdecidinte trafmaniere. Gardostarantoj ĉiam atentatas surrandede de la trupo, kiam ĉi tiu

paŝtiĝas, aŭ estas ripozanta. Se homo sukcesas surprizi ilin, ili neniam revenas en la saman lokon, sen antaŭe sendi unu skoltojn, kaj poste aron da skoltoj; kaj kiam la skoltgrupo revenas, kaj informas, ke ĉia danĝero forestas, dua grupo estas sendita por certigi, ĉu la raporto de la unua ĝustas; nur post tiuj enketoj, la tuta trupo ekmoviĝas.

Gruo formas malfalsajn amiko-ligojn kun anoj el specioj parencaj al la sia. Kaj, estante en mallibereco, ne estas alia birdo, kiu ligiĝas per tiom fidela amikeco kun homo; ĝi ne rigardas ĝin kiel sian mastron, sed kiel sian amikon, kaj provadas al tiu tion ĉiel pruvi.

Tiu, kiu dum kelkaj monatoj ligiĝis al mi, apartenis al iu amiko. Ĝi nepre ne konsentis vidi min pasi preter ĝi kaj ne fari al ĝi kelkajn ĝentilajn afablaĵojn; kaj se okazis, ke mi forgesis elmontri al ĝi mian amikecon, ĝi ne kontentiĝis antaŭ ol esti trudinta min tion fari. Ĉar ĝi estis libera, havante la flugilojn ne malhelpatajn, kaj ĉar ĝi vagadis ĉiam borde de la lago, tuj kiam ĝi ekvidis mian boaton en la malproksimo, ĝi majeste ekflugis, turniĝis ĉirkaŭ mi, dum mi remas, kaj ĝi akompanis min gis la albordeĝejo. Ĝi ĉiam sukcesis trovi min, jen en kampoj, jen borde de Jordano, kaj ĉiam surteriĝis, trovinte min de la alta ĉielo, kelkajn paŝojn for de mi.

Ĝi havis noblajn formojn, kaj ofte ĝi ekdancetis al mi laŭ tiu danco, kiu similas al menueto plenumita far iom petoleta fraŭlino.

Kiam mi forlasis ĝin, mi devis trompkaŝiĝi kaj foriri ŝtele, ĉar alie, ĝi sekvis min kiel ombro.

Kiam post du jaroj mi revenis, ĝi rekonis min, kaj eliginte laŭte vialajn kriojn, ĝi impetis al mi kun flugiloj malfermitaj.

Neniam mi sentis min pli proksima al flugpova kreitaĵo ol kiam mi kunestis kun tiu gruo, tiom amikema kaj serioza, kaj min komprenanta pli ol mi komprenis ĝin.

ANSERO – Rakonto n° 145 p. 215-216

Unu viransero estis tiom ligiĝinta al la anoj de la familio de la kultivisto al kiu ĝi apartenis, ke li venis

renkonten al ili kiam de plej malproksime li ekvidis ilin, elmontrante multajn amikecatestojn.

Pro la elmontroj, kiujn li disdonadis al homaj estaĵoj, tiu birdo estis iĝinta la rifuzito de sia gento. Vivante disiĝinte de siaj samuloj, li fine estis forbarita de la aliaj. Ĉiufoje kiam li aŭdacis faris iajn amindumojn al la anserinoj, tiuj lin disdegnis kaj forpelis. Ofte oni vidis lin, post tiuj malestimaj repuŝoj, iri al siaj homaj amikoj, strebante al la konsolo, almetante la kapon sur iliajn genuojn, ŝajne por pripeti ilian simpatian. Finfine tamen li trovis al si kunulinon siaspecian, maljunan anserinon, kiu estis blindiĝanta, kaj kies kunulinoj forlasis.

La viransero fariĝis ŝia protektanto kaj gardisto. Kiam li taksadis konvene, ke ŝi sin banu, li kaptadis milde ŝian kolon per sia beko, kaj kondukis ŝin tiel, kaj foje malproksimen, ĝis la bordo de iu lageto. Post kiam lia amikino estis eknagiinta, li sekvadis ŝin ĉien, naĝadis ĉe ŝia flanko, kaj antaŭmalhelpis ŝin de la danĝeraj lokoj, tenante ŝin ĉe la kolo al la bona direkto. Poste, kiam la promenado estis sufiĉe daŭrinta, li elektis oportunan alteriĝejon kaj, denove, gvidis ŝin, kiel en la komenco, kun la kolo delikate kaptita de lia beko. Kiam ŝi havis idojn, la viransero kondukis ilin fiere al akvobordo, kaj se iu el ili implikiĝis en ŝlimotruo, li milde pasigis la bekon sub ties korpon, kaj ĝin revenigis al la surfaco.

Maljuna blinda virino, en Germanio, estis kondukata ĉiudimanĉe al la templo fare de viransero, kiu gvidis ŝin ĉe la brako per sia beko. Kiam lia mastrino estis fine sidanta, la palmopiedulo retiriĝis en la apudan tombejon por paŝtiĝi kaj, kiam la diservo estis ĉesinta, li rekondukis ŝin en la domon.

lutage, la pastro, veninte por viziti tiun sinjorinon, kiu ne estis hejme, trovis ŝian filinon, al kiu li esprimis sian surprizon, ke ŝi lasas tiel sian blindan patrinojn sola sur stratoj.

– Ho ! Sinjoro pastoro, aldiris ŝi, ni timas nenion, mia patrino ne estas sola, la viransero estas kun ŝi.

NAJTINGALO – Rakonto n° 207 p. 290-291

Unu najtingalo estis konstruinta sian neston en heĝo el kratagoj, apud Provenca farmbiena domo. Lutage juna legomkultivisto, kiu konjektable volis kontroli sian lertecon, lanĉis ŝtonon al la birdino, en la momento kiam ŝi elĝis el la nesto, kaj rompis ŝiajn du kruojn. Baldaŭ, kaptite de kulposento, kaj bedaŭrante sian senpripenson, li levis la viktimon kaj, ne aŭdacante finmortigi ŝin, li iris remeti ŝin sur ŝiajn ovojn.

Je la morgaŭa tago, scivolema ekscii, kiuj estis la konsekvencoj de lia ago, li rigardegis la kratagheĝon, kaj vidis la virbirdon demeti vermeton surrande de la nesto, apud sia birdino lama, kiu, suferante siajn dolorojn, aspektis ne atenti tiun agon aman. La najtingalo ripetis plurfoje tiun faron ; la vermo vivanta glitadis el la rando de la nesto, sed estis tuj kolektita de la virbirdo maltrankviliĝanta, kiu klopodis ĝin prezenti denove al sia kunulino. Li iradis, kaj venadis, malleviĝis, kaj leviĝis, haltis dum momento sur la rando de la ŝirmejo, kaj ne plu havis ripozon.

Nokto alvenis, sed male de la antaŭa, neniom da kanto, neniom da triloj. La morgaŭan matenon, la kovintino estis mortinta. La masklo, sidante sur tutapuda branĉo, restis senmova ; li faris, kiel Provencaj kamparanoj nomis tion, la “*paume*”, kaj certe, oni povus preni ĝin per la mano.

Kio okazis en la menso de la virnajtingalo, kiu vidis sian femalon malsana, ĝis tia grado, ke ŝi ne povis interesiĝi pri nutro, kaj kiu al ŝi alportis ĝin, ĝin metis al la beko tiamaniere, ke ŝi nur bezonus klini sin por ĝin preni ? Ne plu temas ĉi tie pri la patra instinkto, kiu igas la patron provizi la bekojn de siaj birdidoj, tro malfortaj por serĉi mem manĝon. Tio estas, kiel kelkiuj diros, eble la natura instinkto. Sed la rilatita okazo estas malsama, ĝi temas pri estaĵo, persono, kiu helpas al sia similulo, kiun akcidento lamigis. La kono pri ties situacio ne povis esti montrita al li alimaniere ol per rezono.

KANARIO – Rakonto n° 223 p. 317-318

Ĉiuvespere, post kiam oni estis kovrinta kaj mallumiginta ĝian kaĝon, tiu kanario komencis aŭdigi tian mildan kanton, kian oni neniam aŭdis dum la tago. Post kelkaj minutoj ĝi ĉesigis la kanton, ĉiufoje finpunkciinte sian finaĵon per flugilbruo aparta. Oni kaŝobservis ĝin, kaj ege surprizite vidis grizan muson kroĉitan ĉe la kaĝo, kun la kapeto ŝovita inter la kaĝstangoj, kaj kiu maĉetis grajn-ojn el la trogo. Sed, eĉ pli mirigege afero estis, ke la kanario pasigis la bekon sur la silkeca kolo de la ronguleto kaj ja karesadis ĝin.

La vesperaj voĉumadoj estis ja voko, signaloj. Kaj oni malkovris, ke la muso, por atingi la kaĝon pendantan ĉe la fenestro, grimpadis laŭ la kurteno, kies ŝtofon ĝi estis traborinta ĉe la nivelo de la manĝujo.

Tiu malkovro kaŭzis la musan pereon. Ĝi estis kaptita la postan vesperon, post la kanto de ĝia amiko serino, kaj post la lasta grajno-manĝo, kun la kolo frakasita de la kaptilo, kiun oni estis muntinta por ĝi.

De tiam la birdo ne plu trilis dumtage, ne plu sin banis, ne plu svingis sin sur sia malgranda balancilo, ne plu saltadis de bastoneto al alia. Li spertis grandan ĉagrenon. Ĉar ĝi ne plu estis revidinta la grizan muson, kaj ne komprenis. Sed kiam vesperiĝis, kaj kiam oni estis tirinta la ŝtofon sur ĝian kaĝon, ĝi tiam ekkantadis. Ĝia kanto fariĝis ame-milda, longiĝis laŭ senfinaj triloj petegantaj kaj tristaj. Ĝi estis vokanta al sia amiko, kaj finfine ekdormis, konjektable pensante al ĝi.

Ja neeblas, ke tragedio de amomanko ne estus ekginginta en ĝi. Koron kaj cerbon ĝi havis kaj ĝi tute estis amo. Sed ĝi estis la soleca birdo en sia kaĝo, kaj soleco estas damno el kiu oni elkateniĝu kantante ; tamen la kaĝo iĝis paradizo, kiam griza muso venis vespere vizite pleniĝi ĝin per sia ĉeesto.

Kelkajn tagojn pli poste, oni trovis la kanarion sterniĝinta funde de la kaĝo, kun la flugiloj malfermitaj kaj la kruroj rigidaj.


Vizito de la Muzeo de la Hospitalo Saint-Roch en Issoudun – Ĉambro 4

La eburarto regrupigas la laboron el pluraj bestaj substancoj : la elefantaj dentegoj, la plej uzataj, sed ankaŭ la narvala dentego (la legenda “narvala korno”), ostoj de cetacoj kaj de grandaj surteraj mamuloj.

Tiu kompakta kaj maleebla materialo estas adaptebla al la skulptarto kaj prilaborebla kiel la ligno. De la paleotika erao, ĝi estas uzata kiel altvalora materialo.

En la Merovida epoko, de la VI-a ĝis la VIII-a jarcento, la ebura produktado malpliigas pro la malfacileco pri provizado sed ankaŭ pro la tiama inklino, kiu privilegias la juvelarton, la dekoron el metalo kaj juvelŝtonoj.

Tamen, por la kutimuzaj objektoj, kiaj kombiloj, pingloj, tranĉilteniloj kaj vestaj agrafoj, oni ankoraŭ uzas la ostojn de la grandaj surteraj mamuloj kaj de la cetacoj.



Ebura Merovida bukulo

La buka plato de zono, el ostoj, konservata en la muzeo, estis malkovrita en 1877, sub la transepto de la preĝejo Sankta-Cyr de Issoudun, okaze de rekonstruaj laboroj.

Ĝi konsistas el du partoj alligitaj unu kun la alia per ĉarniro. La plato estas tute elkavigita. Aperturo farita en ĝia supra parto, tutlarĝe, fermita per glitpeco (hodiaŭ malaperinta) ebligis enigi en ĝin malgrandegajn relikvojn. Disvolviĝas ja en Gallio, en Italio, ekde la V-a kaj VI-a jarcentoj, kulto de

la relikvoj, sekve de la malfermo de la tomboj de la sanktuloj, de la martiroj, pro la fragmentigo kaj pecigado de iliaj korpoj aŭ de iliaj vestoj, kies disiĝo obligis la devotecajn lokojn.

La ĉizita dekorado konsistas el geometriaj elementoj, cirkloj, duoncirkloj, rombaj borderoj, ringetoj. Sur la centra panelo estas reprezentita sidanta besto, verŝajne grifo, en formo de leona korpo kun birda kapo. La apude metita dividado enhavas stiligitan krucon, akompanitan de l’ alfa (“α”) kaj de l’ omega (“ω”), unua kaj lasta literoj de la greka alfabeto, kristanaj simboloj, atributoj de Kristo, laŭ la apokalipsaj paroloj : *“Mi estas l’ alfa kaj l’ omega, la unua kaj la lasta, la komenco kaj la fino”* (22-13).

Alia liturgia objekto el ostoj: fragmento de episkopa bastono, distinga emblemo de la abatoj, kiu estis eligita en 1855 el la grundo de la kriptoj de la abatejo Nia Damo. Tiu objekto de la XII-a jarcento elvokas viran personon sidantan sur la kruroj de reptilio, kiu encirkligas ĝin. De la Karolida epoko, “Ora epoko de la eburarto”, estas konservitaj ĉefe religiaj objektoj : bindaĵoj, katedraj platoj, diptikoj, kestetoj, transporteblaj altaroj.

Ankaŭ la gota epoko estas periodo kiam eburarto estas unu el la branĉoj la plej disvolvigitaj de la multvaloraj artoj, markita en la XIV-a jarcento far la superregado de la Pariza produktado. Oni konas tiam kelkajn nereligiajn objektojn tiajn, kiaj estas skatoloj aŭ spegulvalvoj reprezentantaj la “kortezan Mezepokan arton”. Laŭ *Danielle GABORIT-CHOPIN*, la

spegulvalvoj estis parto de ĉiu tualetnecesajo iom rafinita kaj estis portataj pendigitaj ĉe la zono aŭ en saketo. Ili konsistis el paro da rondformaj platetoj, ofte ĉeangule garnitaj de kvar groteskaj vizaĝoj aŭ de drakoj, ŝirmante spegulojn el polurita metalo. La ekstera surfaco de tiuj platetoj estis skulptita laŭ kortezaj Mezepokaj, aŭ romaneskaj artoj.

La spegulvalvo de Issoudun estas komparebla, laŭ siaj organizo kaj ikonografio, al la objektoj produktitaj en la Parizaj metiejoj (pluraj ekzempleroj en la Muzeo *Louvres*).

Sur unu el la platetoj, kvar drakoj ĉeangule elvokas amoran scenon. En ĝardeno simboligita de du arboj, virino lokas sur la kapon de sia amanto, antaŭ ŝi genuiĝinta, kronon el plektitaj floroj, karesante lian manon. Sur la alia fragmentita valvo aperas persono mentone tenita, deturnante la kapon.

Alia ebura profanuzata objekto estis elfosita okaze de la sama prifosado, sur la loko de la abatejo Nia Damo, ĉe la limo de la norda ramparo de la kastelo, okaze de laboroj por nivelo de la placo Sankta-Ludoviko, en 1876. Temas verŝajne pri bastonetpeco de “*honchet*” aŭ “*jonchet*”. Tiu ludo konsistas en depreno, helpe de hoko, unu post la alia, de eburaj bastonetoj, pelmele ĵetitaj, ne movante la aliajn.

Elfrancisgis *Jean DIETRICH*

Samseksemo kaj kunligiĝo

Kiam la redaktoro cerbumas pri la politika kaj socia aktualeco...

Kaj serĉas temojn por plenigi la 24 paĝojn de la NORDA GAZETO.

Nuntempe oni multe parolas pri "Mariage homosexuel". Sed se vi serĉas la signifon de la vorto "Mariage": Ĉu en Larousse-vortaro, vi trovos "Acte solennel par lequel un homme et une femme établissent entre eux une union"; Ĉu en Robert-vortaro, vi trovos "Union légitime d'un homme et d'une femme". Do laŭ niaj franclingvaj referencoj, laŭ niaj franclingvaj oficialaj difinoj, estas memkompreneble, ke "Le mariage est une affaire hétérosexuelle"...

Bof! Verdire miaopinie tiu semantika konstato ne estas treege ĝena!... Ja supozeble, se iu estonta franca leĝo leĝigas la aferon, malgraŭ la nunaj diversdevenaj – sed ĉiam tiom mordemaj kaj incitemaj – kontraŭstaroj, nia Francia Akademio kaj niaj vortaroj taŭge kompletigos la fundamentan difinon de la vorto "Mariage"... Kiu ja povas profiti sian etimologie tute neŭtran aspekton. Oni ankaŭ povas supozi, ke la leĝo mem trovos alian vorton ol "Mariage" por difini tiun samseksan aferon... Ambaŭkaze estos elturniĝo... Kaj ĉiumaniere ĉi-tiuj supraj pripensoj kvietigas miajn francecajn mal-

trankvilojn!!...

Sed la afero multe pli gravas en Esperanto. Ja en nia kara lingvo la vorto "Geedziĝo" etimologie havas neelturneblan precizan signifon kuŝantan en la asocio de la prefikso "ge" kaj de la radiko "edz". Estas do klare, ke la vorto "Geedziĝo" rilatas al la du malsamaj seksoj difinitaj de la prefikso, kaj neniel povas difini iun samseksan pariĝon.

Mi starigas la problemon al niaj glegantoj: Vi, eminentaj esperantistoj de nia eminenta federacio, pripensu la aferon kaj estu ekde nun pretaj adaptiĝi al la eventuala nova leĝo; Vi konstruu (laŭ la fundamentaj reguloj de la vortfarado plurelementa, funkcia aŭ gramatika) la bazan substantivon por difini la franclĝigotan samseksunuiĝon.

Bonvolu do sciigi la substantivon de vi sugestitan.

Mi persone (verŝajne pro stranga pensmaniero) pensas pri "Gejedziĝo". Sed unufanke tia vorto tro similas al la nuna "Geedziĝo" kaj tial povus inspiri konfuzon. Kaj aliflanke, kvan-

kam laŭ la PIV la radiko "gej" validas por ambaŭ seksoj, ĝi tro similas al la franca "gay", kiu laŭkutime rilatas nur al la vira sekso – kiel "lesbienne" rilatas al la virina sekso. Kaj krome same la radiko "edz" estas baze vireca... Ni devas ne forlasi la alian sekson.

Nu! Kion vi pensas pri "Samseksa enpariĝo" (aŭ eventuale: "Samseks-enpariĝo" el "samsekse enpariĝi")? Aŭ eble: "Samseksa kunligiĝo" (aŭ eventuale "Samsekskunligiĝo")? Aŭ ankoraŭ: "Samseksa unuiĝo". Aŭ eble finfine plej simple kaj tre klare: "Samseksunuiĝo"?

Kaj jen! Tiel cerbuminte, kaj danke al la modelo de Esperanto, mi sugestas, ke la estonta franca leĝo rilatu tutsimple al "l'Union homosexuelle", lasante al la vorto "Mariage" ĝian nunan specifan ambaŭseksan signifon...

Claude LONGUE-ÉPÉE

Redaktis la 8-an de Novembro 2012

Fédération Espéranto-Nord

Evoluo de la listo de la membraro

	2005	2006	2007	2008	2009	2010	2011	2012
Arras-Espéranto	25	30	28	28	23	24	25	23
Boulogne-Espéranto	7	9	5	4	0	4	0	0
Dunkerque-Espéranto	36	35	31	28	19	19	22	15
Lille-Villeneuve-Espéranto	33	44	33	33	32	31	21	24
Valenciennes-Espéranto	19	29	29	22	25	24	15	15
Somme-Espéranto (Espéranto 80)	0	0	0	0	0	0	0	22
Isolé(e)s	24	23	22	11	20	16	16	19
TOTAL	144	170	148	126	119	118	99	118

Koncize Mallongaĵoj

Monda Amikaro

De pli ol dek jaroj, la "Rotaria Amikaro de Esperanto" (RADE) regule ĉeestas la mondajn kongresojn de Rotario per starigo de inform-stando. (Bangkoko, 38000 rotarianoj el 160 landoj; Lisbono, en 2013).

Ekoturismo

– Poŝforma vortaro en 5 lingvoj, inkluzive Esperanton. Kvaropa aŭtora kolektivo, kvar provlegintoj. Unua eldono kun kelkaj mankoj facile forigeblaj (Kava-Pech).
– En Varsovio (Pollando) la nova retosistemo de urbaj bicikloj funkcias sub la Esperanto-nomo "VETURILO". Jam 125 luo-stacioj kun 2100 bicikloj.

Tinĉjo

Nova albumo de Tinĉjo en Esperanto (**Le Temple du Soleil / La Temple de l' Suno**).

Ne sufiĉe alta

Artikolo en la ĵurnalo "The New York Times" 1/6/2012.

Temo: La anglalingva nivelo de iuj pilotoj kaj flugkontrolistoj ne ĉiam sufiĉas por eviti gravajn akcidentojn. (Franca traduko en "La Informilo"). Praktikaj ekzemploj rilate la miselparolon en diversaj flugkompanioj.

Anoncetoj

Rilate Esperanton kaj kolektaĵojn de pluraj anoncetoj: "Lille Métro" en Junio 2012. "La Veillée des Chaumières" en Marto/Majo. Revuo "Pleine Vie".

Ĥaoso

En Lille, 1800 kandidatoj el 100 nacioj partoprenis en tutmondaj mens-ludoj: briĝo, ŝako, damoj, goo. "Un mic-mac de langues incroyable" estas skribite en Nord Eclair (12/8/2012).

Sciencficia kolekto

Forpasis konata sciencficia verkisto Harry HARRISON. Honora komitatano de UEA, li praktikis Esperanton kaj menciis la universalan lingvon en

tuta serio de SF-romanoj (ekzemple, en Esperanto: "Stratoj de Aŝkalono" kaj "La Verda Estonteco").

Repertuaro

En Britio, la teatro de SHAKESPEARE programis en 2012 prezentojn de 37 trupoj, kiuj aktoris en... tridek sep lingvoj!!

Unismo

– En la libro "L'UNIVERSALISME: L'UNISMO" Djémil KESSOUS studas ekonomiajn kaj mondpolitikajn problemojn. Pluraj artikoloj temas pri ZAMENHOF kaj Esperanto (Eldonis **Acratie**).
– Claude TELLIER, en alia verko, rakontas personajn memorarojn. Notindas: "Vojaĝo en Esperantista Medio" (1991).
– Mallonga dialogo pri Esperanto en la franca filmo "Leffrontée". (ARTE, 5/8).

Kongresaj Reagoj

En la Aŭstralia gazeto "Hornsby Advocate", N. ELSE raportas pri la Universal Kongreso kaj la iniciato de aktivuloj (Libro de Sam GREEN "The Universal Language" en publikaj bibliotekoj de SYDNEY. Ankaŭ en filmo (Utopia en four movements) Sam GREEN priskribas la etoson de Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Grand-Formato



Dum unu monato (Oktoebro 2012), Lilli GILOTEAUX ekspoziciis 15 grand-formatajn akvarelojn en la urbodoma parko de CROIX, Nordfrancia urbo kun ZAMENHOF-strato.

Tut-paĝe

"Ils parlent espéranto". Tutpaĝa artikolo kaj intervjuo kun Jean-Claude ROY en "Le Courrier Picard" (26/8/2012).

Nur mencioj

"Au même titre que le célèbre Espéranto". en "20 Minutes", (18/9/2012).
En "Télé Matin" (28/9/2012), dum kroniko pri AZNAVOUR, plurlingva kantisto, inter la ĵurnalistoj aŭdiĝas la demando: "... et en espéranto??".

Lingva festo

En Lille la 8a Festivalo de lingvoj okazis en halo de universitato, kun debatoj kaj informbudoj pri multaj lingvoj, inter aliaj Esperanto. Vizitis ĝin studentoj, edukistoj kaj lingvosciivolemluloj, eldonistoj (Assimil kaj aliaj).

"Espéranto: internationale par nature et par vocation."



La turismoficejo de Villeneuve d'Ascq informas en 16 lingvoj, ankaŭ en Esperanto.

Kompilis kaj komentis
Lucien GILOTEAUX

« Croix au détour de ses rues, de ses balcons et maisons, ses églises et surtout son kiosque, oasis de verdure très appréciée de l'artiste ».

Atentigo de la redaktoro

Trankviliĝu karaj legantoj!

Mi ne rediru miajn kutimajn instigojn, por ke vi sendu **raportojn kaj artikolojn** aperontajn en la kolumnoj de nia gazeto, kaj por ke vi sciigu viajn komentojn, rimarkojn, kritikojn pri niaj jam aperintaj artikoloj. Mi ja certas, ke jam delonge vi pretas diligente fari la neceson!!

Sed, mi rimarkigos al vi: ke la **“Peticio por Esperanto en Abiturienta Ekzameno”** estu sendota, kun kiel eble plej multe da subskriboj, antaŭ la 31-a de Oktobro 2012; ke ĝis nun ni esperas rikolti ĉirkaŭ 30000 subskribojn; ke do ne

estas tro malfrue por ke vi finplenigu per subskriboj la petskribon de vi ricevitajn en Oktobro kaj por ke vi resendu ĝin al la precizigita adreso.

Mi insistas, por ke vi nepre aliĝu kaj pagu vian **kotizon al via grupo kaj al via federacio**. Profitu la okazon por aliĝi ankaŭ al *“Espéranto-France”* kaj UEA. Kaj instigu viajn konatojn kaj amikojn same aliĝi...

Mi memorigas, ke la **ekzamensiesio de KER-ekzamenoj** je la 9-a de Junio 2012 en Araso estis granda sukcesoj (18 kandidatoj kaj 17 sukcesoj!).

Vi informu vin pri la venontaj sesioj kaj enskribiĝu por trapasi, kaj prisukcesi, tiun ekzamenon laŭ via nivelo (B2, C1).

Mi sendas kun tiu gazeto, al vi kaj al viaj gefamilianoj kaj viaj geamikoj, miajn plej sincerajn bondezirojn por la nova jaro 2013.

Ĝi alportu al vi ĉiuj bonfarton kaj feliĉon... la finon de la ekonomia krizo... la sukceson de nia peticio por Esperanto en la abiturienta ekzameno... la kontentigon de ĉiuj viaj deziroj.

Claude **LONGUE-ÉPÉE**

Asociaj kaj redakciaj informoj

FÉDÉRATION ESPÉRANTO NORD Prezidanto (eldona direktoro de la gazeto):

Arlette **PLUTNIAK**

22 rue d'Arras 62123 SIMENCOURT

Tel : 03 21 55 61 35

eplutniak@esperanto-nord.org

Federacia retejo:

<http://www.esperanto-nord.org>

Sekretario:

Katja **BOEN**

51 Avenue du Maréchal Leclerc

59130 LAMBERSART

Tel : 03 20 92 31 36

cboen@esperanto-nord.org

Tarifo de kotizoj:

13 € por plenkreskulo, 8 € por junulo, studento, senlaborulo.

Per ĉeko al la ordono de “Fédération Espéranto-Nord” sendota al la kasisto:

Xavier **VILAIN**

Résidence l'Alcyon – Apt. 41

90 rue du Maréchal Joffre

59240 DUNKERQUE

Tel. 06 70 65 93 29

xvilain@esperanto-nord.org

BULTENO “NORDA GAZETO”

Ĉefredaktoro:

Claude **LONGUE-ÉPÉE**

320 rue des 4 Bons Dieux

59235 BERSÉE

Tel. 03 20 59 28 80

plonguepee@free.fr

Konstantaj korespondantoj:

★ Amiens

Cyrille **DÉCOUTURE**

prezidanto@esperanto80.org

★ Arras

Jean **HENNEBERT**

jhennebert@esperanto-nord.org

★ Boulogne

Marie-Jeanne **LINÉ**

mjline@esperanto-nord.org

★ Dunkerque

Elise **DEPLA**

edepla@orange.fr

★ Lille-Villeneuve

Katja **BOEN**

cboen@esperanto-nord.org

★ Valenciennes

Jean-Marc **FRATARD**

jmfratard@esperanto-nord.org

Enpaĝigado:

Cyrille **DÉCOUTURE**

10 chemin des Oiseaux

76270 FESQUES

prezidanto@esperanto80.org

Tel: 06 78 80 78 45

Kontrolantoj-korektantoj:

Claude **Longue-Épée**

plonguepee@free.fr

Pascal **VILAIN**

p.vilain83@orange.fr

Presado, enkovertigo, sendado:

Richard **VALET**

Rue du Boulenriez 59235 BERSÉE

rf.valet@wanadoo.fr

La tekstoj de artikoloj estu sendotaj antaŭ la 30-a de Aprilo 2013.

Partoprenis je tiu ĉi numero

Claude LONGUE-ÉPÉE, Jean HENNEBERT, Chantal, Joëlle, Katja, Lucette, Marianne, kaj al miaj spionoj Didier, Fabrice, Roland, Cyrille DÉCOUTURE, Xavier Vilain, Michel Dechy, Katja BOEN, Christian FINEZ, Jean-Marc Fratard, Jean-Claude MOUYS, Jean DIETRICH, Roland PLATTEAU, Lucien Giloteaux.